



Kial vere kolapsis la tri turoj de MKC?



KERSTIN WICHMANN:

**Kapti la malgrandajn
momentojn**

Stefan Maul

El verva vivo ĵurnalista



Faktoj kaj spertoj el la vivo de la ĉefredaktoro de



En la historio de Esperanto ofte ĵurnalistoj ludis sufiĉe gravan rolon. Unu el ili estas Stefan Maul, kiu dum 45 jaroj aktivas, verkante kaj redaktante. Li precipe konatiĝis kiel fondinto kaj multjara ĉefredaktoro de MONATO.

Kiel kaj kial li fariĝis esperantisto kaj ĵurnalisto, kiu batalas kontraŭ maljustaĵoj ĉiuspecaj, tion vi ekscias per tiu ĉi informriĉa kaj parte kortuŝa libro. Akompanu liajn ofte neordinarajn vivon kaj karieron de milit-infano ĝis la 25-jara jubileo de MONATO.

Prezo: 20,00 EUR + afranko

Mendu ĉe Flandra Esperanto-Ligo:

Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio

Rete: www.retbutiko.net - retbutiko@fel.esperanto.be

Printempa etoso

ĉe la lago de Ohrid

Tutjare Makedonion vizitas turistaj grupoj el Albanio, Kosovo, Bulgario kaj Grekio. Dum la vizito de la aŭtoro al Makedonio komence de marto ĉi-jare, li vidis plurajn, kiuj loĝis en hoteloj ĉe la bordo de belega lago de Ohrid. Bulgaroj kaj grekoj venas ĉi tien por viziti la monaĥejojn (Sankta Naumo, Kaliŝte kaj aliaj), same kiel la kastelon kaj malnovan urboparton sur la monteto en Ohrid (iama ĉefsidejo de regantoj bulgaraj kaj bizancaj).



12

Kapti la malgrandajn momentojn

En la venontaj numeroj Monato prezentos al vi verkojn de kelkaj elstaraj fotantoj, ĉu profesiaj, ĉu amatoraj, kiuj per siaj verkoj iel „frapis” la redaktoron. En tiu ĉi unua artikolo Monato prezentas la verkaron de sinjorino Kerstin Wichmann, kiu loĝas en Stadland, malgranda germana vilaĝo.



14

Babel

La rakonto disvolviĝas ĉirkaŭ la teorio de la ĥaoso. Se papilio ekflugas en unu kontinento, povas esti, ke la venteto kreita ĉiam ade fortiĝas kaj finfine en alia kontinento kaŭzas cunamon. Estus malsaĝe malkaŝi al vi, kio aŭ kiu estas la papilio en tiu ĉi filmo, ĉar nur en la lastaj minutoj de la rakonto la spektanto konstatas, kio en tri kontinentoj kaŭzis ĉion, kio estas montrata en la filmo.



18

Kial vere kolapsis la tri turoj de MKC?

Ĵurnalistoj raportis pri la kolapso de du turoj de la Monda Komerca Centro (MKC) la 11an de septembro 2001, kiam ilin trafis du flugmaŝinoj. Nun specialistoj pridemandas la oficialan raporton. Kio vere okazis en tiu sortoturna evento, kaj kio estas la fono de tia katastrofa mondsdua atako? Ian Fantom priesploras ...



24

MODERNA VIVO

Lingvoj.....	8
La angla: triumfas banaleco	
Israelo.....	8
Solvo tute ne ortodoksa	
Naturo.....	9
Birdo de la jaro	
Polico.....	10
Fotile kaptitaj	
Ĉinio.....	11
Ŝanĝiĝanta feliĉo-festo	

TURISMO

Makedonio.....	12
Printempa etoso ĉe la lago de Ohrid	

FOTOGRAFADO

Kerstin Wichmann.....	14
Kapti la malgrandajn momentojn	

MEDIO

Eŭropa Unio.....	16
Semajno pri neelĉerpiĝonta energio	

ARTO

Filmo.....	18
Babel	

LIBROJ

Ruza leporo kaj ĉiuj aliaj.....	20
Atendinda dramartaĵo.....	21
Nova krimromano el Aŭstralio.....	22

SPIRITA VIVO

Opinio.....	23
Gvatu la turon!	

ESEO

La nova monda ordo.....	24
Kial vere kolapsis la tri turoj de MKC?	

Abonoj.....	4
Enkonduko.....	5
Leteroj.....	6
El mia vidpunkto.....	7
Anoncetoj.....	27

Vizitu
www.Monato.net
kun novaj kontribuoj ĉiutage!

Senpagan pasvorton por viziti la paĝojn vi petu de monato@monato.net.
Menciu vian FEL-kodon, kiun vi trovos supre sur la adreŝlipo.

Kiel pagi vian abonon de MONATO?

► Rekte al la eldonejo ...

- Per via FEL-konto.
- Per UEA-konto al la konto fela-x de Flandra Esperanto-Ligo.
- El Belgio al konto 000-0265338-43 de Flandra Esperanto-Ligo, Antverpeno.
- El Eŭrolando al IBAN-konto de Flandra Esperanto-Ligo, BE66 0000 2653 3843 (BIC-kodo BPOTBEB1), Postbank 1000 Brusel.
- El Usono per ordinara usona ĉeko.
- Per Visa (sed ne Visa Electron) aŭ Mastercard. Sendu la numeron, kontrolnumeron kaj validodaton fakse al +32 32 33 54 33, letere al Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen aŭ rete al rebutiko@fel.esperanto.be (eblas ĉifri la mesaĝon per PGP/GPG).
- Per internacia poŝtmandato nome de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.
- Per internaciaj respondkuponoj. Unu kupono nur maldekstre stampita valoras 0,75 EUR.
- Per bankĉeko tratita je belga banko en eŭroj. Aldonu 12 eŭrojn pro la bankkostoj. Bv. noti, ke personaj ĉekoj ne plu estas akceptataj en Belgio.

► Tarifoj

Ŝtato de la paganto		MONATO		La Jaro aere	
		surface	aere	1 fojon monate	tuj
Argentino	EUR	23	26	5	9
Aŭstralio	AUD	82	90	9	17
Aŭstrio	EUR	46	50	5	9
Belgio	EUR	46	56	5	9
Brazilo	EUR	23	26	5	9
Britio	GBP	32	35	4	6.5
Bulgario	EUR	23	26	5	9
Ĉeĥio	EUR	30	34	5	9
Danio	DKK	345	375	40	70
Estonio	EUR	23	26	5	9
Finnlando	EUR	46	50	5	9
Francio	EUR	46	50	5	9
Germanio	EUR	46	50	5	9
Germanio orienta	EUR	41	45	5	9
Grekio	EUR	41	45	5	9
Hispanio	EUR	41	45	5	9
Honkongo	EUR	41	45	5	9
Hungario	EUR	23	26	5	9
Irlando	EUR	46	50	5	9
Islando	EUR	46	50	5	9
Israelo	EUR	41	45	5	9
Italio	EUR	46	50	5	9
Japanio	JPY	6900	7300	860	1260
Kanado	CAD	73	78	9	15
Kipro	EUR	30	34	5	9
Koreio	EUR	41	45	5	9
Kroatio	EUR	23	26	5	9
Latvio	EUR	23	26	5	9
Litovio	EUR	23	26	5	9
Luksemburgo	EUR	46	50	5	9
Malto	EUR	30	34	5	9
Nederlando	EUR	46	50	5	9
Norvegio	NOK	390	430	45	71
Nov-Zelando	NZD	93	99	9	18
Pollando	PLZ	99	110	22	36
Portugaliao	EUR	37	41	5	9
Rusio	EUR	23	26	5	9
Singapuro	EUR	41	45	5	10
Slovakio	EUR	23	26	5	9
Slovenio	EUR	30	34	5	9
Sud-Afriko	EUR	41	46	5	10
Svedio	SEK	430	465	49	84
Svislando	CHF	74	81	9	14
Tajvano	EUR	41	45	5	9
Usono	USD	61	65	8	13
Baza tarifo	EUR	46	50	5	9

Prezo de la retaj versioj (askia, unikoda aŭ PDF): 60% de la surfaca tarifo.

► aŭ pere de peranto ...

- **Aŭstralio:** Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson Str. 2016 Redfern. Reto: libroservo@esperanto.org.au.
 - **Aŭstra:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38, 3400 Klosterneuburg. Pĉk. 7 127 744. Reto: leopold.patek@esperanto.at.
 - **Belga:** Vlaamse Esperantobond, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen (pĉk. 000-0265338-43). Reto: financo@fel.esperanto.be.
 - **Brazilo:** Brazilo Esperanto-Ligo, Caixa Postal 3625, 70084-970 Brasilia. Reto: bel@esperanto.org.br.
 - **Brita:** David Kelso, 5 Craigenhill Road, Kincadzw, CARLUKE ML8 4QT, Tel 01555 759 166. Reto: davekelso@yahoo.co.uk
 - **Ĉeĥa:** Pavel Polnický, Kunštátská 1350/III., 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651. La konto de ĈEA en Komerční banka: 3330 021/0100, variab. symbol por gazeto Monato: 07001. Reto: cea.polnicky@quick.cz.
 - **Dana:** Revuservo de DEA, Arne Casper, Bryggervangen 70, 4. Tv., DK-2100 København Oe. Tel.: +45 39 20 63 48 Poŝtel.: +45 21 40 84 87. Reto: arne-casper@email.dk.
 - **Estono:** Virve Ermits, Vallimaa 17-8, EE-93812 Kuressaare. Reto: virveermits@hotmail.ee.
 - **Finna:** Päivi Saarinen, Esperanto-Asocio de Finnlando, Siltasaarekatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki, Finnlando. Reto: eafoicejo@esperanto.fi
 - **Franca:** Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisaie, F-75004 Paris (pĉk.: 855-35 D Paris). Reto: esperanto-france@esperanto.org.
 - **Germanaj:**
 - Hilde Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg (banko: LIGA Augsburg 113514, BLZ 750 903 00). Reto: s.h.maul@t-online.de.
 - Literatura-Servo "Espero", Rolf Beau, Eißer Kirchweg 18, D-27333 Schweringen (Volksbank Grafenschaft Hoya eG, Konto-numero: 0 705 447 500, BGN: 256 635 84). Reto: RoBo. ESPERO@t-online.de.
 - Hans Dieter Platz, Postfach 1148, D-34303 Niedenstein (Postbank Ludwigshafen, pĉk 91856-676 (BLZ 54510067)). Reto: HDP@internacia-festivalo.de.
 - Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Str. 9, D-55129 Mainz. Reto: wolfgang.schwanner@tiscalinet.de
 - **Hispana:** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat, 1008, E-08200 Sabadell (Caixa de Pensions 2100-0461-90-0200055053). Reto: kea-kasisto@esperanto.cat.
 - **Hungara:** AbonaSoft, HU-1093 Budapest, Bakats u. 1/3 III.1. Reto: abonasoftware@gmail.com.
 - **Irana:** Irana Esperanto-Centro, P.O.Kesto 17765-184, Tehran.
 - **Irlanda:** Esperanto-Asocio de Irlando, 9 Templeogue Wood, Dublin 12. Reto: noviresp@eircom.net.
 - **Islanda:** Islanda Esperanto-Federacio, Pósthólf 1081, IS-101 Reykjavík. Reto: esperant@ismennt.is.
 - **Itala:** Itala Esperanto-Federacio, Via Villorresi 38, I-20143 Milano (pĉk.: 37312204). Reto: f.esp.it@infinito.it.
 - **Japano:** Japana Esperanto-Instituto, Wa-
- sedamati 12-3, Sinzyuku-ku, Tokio 162. esperanto@jei.or.jp.
 - **Kanada:** Kanada Esperanto-Asocio, P.O.Box 2159, Sydney, B.C., V8L 3S6. Reto: iwolemskatl@shaw.ca.
 - **Kataluna:** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 1008, E-08200 Sabadell (Caixa de Pensions 2100-0461-90-0200055053). Reto: kea-kasisto@esperanto.cat.
 - **Korea:** Seula Esperanto-Kulturcentro, 601 ho, Dongboog B/D 12-3, 2 ga Choongmu-ro Chung-ku Seulo, Koreio. 100-860 Reto: esperant@unitel.co.kr
 - **Kostarika:** Hugo Mora, Apartado 4981, 1000 San José. Reto: miaumiau1@ice.co.cr
 - **Kroata:** Kroata Esperantista Unuiĝo, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb. Reto: mbelosev@public.srce.hr.
 - **Latva:** Margarita Zelve, str. Rupniecibas 35-13, Riga, LV-1045, Latvio. Tel.: +371 6407174. Reto: Margarita@rsu.lv.
 - **Litova:** Laimius Stražnickas, Laimius Stražnickas, LEA, a.k.187, LT-01003 Vilnius-C, Litovio. Reto: laimiuslt@gmail.com.
 - **Luksemburga:** LEA, 1 rue de Kehlen, 8394 Olm (pĉk.: Luksemburgo 8936-12). Reto: esper_lu@geocities.com.
 - **Nederlanda:** UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam. Reto: uea@inter.nl.net.
 - **Norvega:** Eldonejo Esperanto A/S, Olaf Schous vei 18, 0572 Oslo 5. Reto: inform@esperanto.no.
 - **Nov-Zelanda:** G. David Dewar, 4 Harlech Mews, Christchurch 8042. Reto: gddewar@ihug.co.nz.
 - **Pola:** Danuta Leyk, ul. Miedzyborska 117 m 8, PL-04-013 Warszawa, konto 06-1020-1156-0000-7102-0036-6328 ĉe PKO BP XIV O/Wwa. Reto: dankal@epf.pl.
 - **Ruslandaj:**
 - Halina R. Gorceka, RUS-236039 Kalingrad, ab. ja. 1248, Ruslando. Reto: sezonoj@gazinter.net.
 - Mikaelo Ĉertilov, Pf. 21, RUS-143006 Odincovo 6, Ruslando. Tel.: 095-5934964. Banko: "AVTOBANK-NIKOIL", konto N.: 42301.81 0.3.0018.0084867. Reto: mikaelo@km.ru.
 - **Sud-Afrika:** Colin Beckford, 43 Fairview Crescent, Milnerton Ridge, 7441. Reto: cbeckford@telkomsa.net.
 - **Svedaj:**
 - Esperanto-Skolan, Svenska Arbetar Esperanto-Förbundet, Svartviksvägen 14, S-123 52 Farsta, p.g. 5 31 60 - 8. Reto: persson.esperanto@stockholm.mail.telia.com.
 - Sveda Esperanto-Federacio, c/o Lisbet Andreasson, Kajsa Kavats gata 8, SE-242 35 Hörby, Svedio. Reto: bertil.andreasson@horby.mail.telia.com.
 - **Svisa:** Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH-4224 Nenzlingen, ĝirkonto 40-52 612-7 Basel. Reto: ch_scheidegger@bluewin.ch.
 - **Usona:** ELNA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530. Tel.: +1 510 653 0998, Faks: +1 510 653 1468. Reto: elna@esperanto-usa.org

MONATO, internacia revuo sendependa pri politiko, ekonomio kaj kulturo; monata revuo en la internacia lingvo Esperanto; fondinto: Stefan Maul; 28a jarkolekto; aperas principe la 1an de ĉiu monato, escepte de aŭgusto; abontarifo varias laŭlande.

100 konstantaj kunlaborantoj kaj korespondantoj en 45 landoj; legantoj en 65 landoj; aperas nur originale en Esperanto verkitaj artikoloj (ne tradukoj); represoj kaj tradukoj el MONATO nur kun indiko de la fonto; kopi-raĵto ĉe la eldonejo; ekzistas kaseda versio de MONATO por blinduloj, mendu ĝin pagante 12 EUR al UEA, konto robm-b; la enhavo de la artikoloj ne nepre kongruas kun la opinio de l' eldonejo.

Verantw. uitgever: Paul Peeraerts, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.

eldonejo:

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio; telefono: +32 3 234 34 00, telekopiiĵo: +32 3 233 54 33, retroŝto: eldonejo@monato.net, Skype-telefono: fel-monato; valida anonctarifto: n-ro 9; kompostita, presita kaj vinktitita en la eldonejo.

ĉefredaktoro:

Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg.
Rete: chefredaktoro@monato.net.

reviziantoj:

Hector Alòs i Font, Edmund Grimley Evans, Katalin Kováts, Jens S. Larsen, Brian Moon, Anna kaj Mati Pentus, Alexander Schlafer.

redakcia sekretario:

Paul Peeraerts. Rete: redakcio@monato.net.

grafiko:

Joan-Ferriol Masip i Bonet.

redaktoroj:

- **Arto:** Claude Nourmont-Moon, 2 Om Kläppchen, L-5682 Dalheim, Luksemburgo. Rete: arto@monato.net.
- **Ekonomio:** Roland Rotsaert, Visspaanstr. 97, B-8000 Brugge, Belgio. Rete: ekonomio@monato.net.
- **Enigmoj:** Jean Pierre VandenDaele, Hisselsgasse 85, B-4700 Eupen, Belgio. Rete: enigmoj@monato.net.
- **Eseoj:** Sendu al la koncerna redaktoro, depende de la temo.
- **Hobio:** Evgeni Georgiev, Auslandspresse, Bankgasse 8, A-1010 Wien, Aŭstrio. Rete: hobio@monato.net.
- **Komputado:** Edmund Grimley Evans, 2 Comfrey Court, Cambridge, Britio CB1 9YJ. Rete: komputado@monato.net.
- **Leteroj:** MONATO, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen, Belgio. Rete: leteroj@monato.net.
- **Libroj:** Boris Kolker, 2487 N Taylor Rd, Apartment 11, Cleveland Heights, OH 44118, Usono. Telefono/faksilo (216) 297-0370. Rete: libroj@monato.net. **Nota:** Libreccenzojn oni ne sendu al la redaktoro proprainciate. La kunlaborantoj ricevos la librojn kaj la recenzopetojn de la eldonejo.
- **Lingvo:** Yamasaki Seikō, Higasi Koigakubo 3-18-12 Kokubunzi-si, 185-0014 Tokio, Japanio. Rete: lingvo@monato.net.
- **Medio:** provizore sendu viajn kontribuojn al la eldonejo: MONATO, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio. Rete: medio@monato.net..
- **Moderna vivo:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio. Rete: moderna_vivo@monato.net.
- **Noveloj kaj Poezio:** Geraldo Mattos, Rua Rio Jutai 320, 82840-420 Curitiba PR, Brazilo. Rete: noveloj@monato.net.
- **Politiko:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio. Rete: politiko@monato.net.
- **Scienco:** Thomas M. Eccardt, 455 E 14th St. #3C, New York, N.Y. 10009, Usono. Rete: scienco@monato.net.
- **Spirita vivo:** Gerrit Berveling, Kalverstraat 8 B, NL-8011 LH Zwolle, Nederlando. Rete: spirita_vivo@monato.net
- **Sporto:** Grigorij L. Arosev, a/ja 5, RUS-127224 Moskva, Ruslando. Rete: sporto@monato.net.
- **Ŝerco kaj satiro:** Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg, Germanio. Rete: sherco_kaj_satiro@monato.net.
- **Turismo:** Evgeni Georgiev, Auslandspresse, Bankgasse 8, A-1010 Wien, Aŭstrio. Rete: turismo@monato.net.

Disfalema alianco



Kiam la usona prezidanto George W. Bush [ĝorĝ dablju buŝ] planis sian kriman militon kontraŭ Irakon, li serĉis komplicojn. Tiun bandon eŭfemisme li nomis „alianco de bonvoluloj” – pli trafe oni devus diri „alianco de supluloj”. Fine membris 36 registaroj en tiu bando; ni ne parolu en tiu ĉi kunteksto pri ŝtatoj, ĉar en multaj el la koncernaj landoj la popolo plimulte kontraŭis la decidon de siaj registoj. Unu el la plej supraj estis la brita ĉefministro Tony Blair [teŭni blea]; sed nun li anoncis retiri siajn trupojn el Irako, kiel antaŭ li faris jam 14 aliaj komplicoj. Malfrue ankaŭ Blair perceptis, kion ni ordinaraĵoj homoj dekomence diris, nome ke en tiu milito oni ne povas venki, sed nur provoki intercivititan militon. Sed Bush mem kredas, ke li devos nur sendi pliajn 21 500 soldatojn al Irako por tamen venki, kvankam eĉ liaj propraj konsilantoj de tiel nomita Baker-komisiono rekomendis retiri la usonajn trupojn.

Kiam mi legis, ke do ankoraŭ soldatoj el 22 landoj militas en Irako, mi tre miris pri tiu nombro. Mi havigis al mi liston de tiuj landoj – kaj eĉ pli miris. Nur el 5 landoj venas 1000 (Kartvelio) aŭ pli multaj soldatoj: 130 000 el Usono, 7100 el Britio, 2300 el Suda Koreio kaj 1240 el Aŭstralio. Ankaŭ Suda Koreio, cetere, intencas redukti siajn trupojn. Pollando disponigis 900 kaj Rumanio 754 soldatojn. Danio intencas retiri siajn 463 batalantojn. Restas 300 el Salvadoro. Kaj la aliaj? Mi demandas min, kiujn aliajn gravajn taskojn, krom komplezi al Bush, povas plenumi 150 soldatoj el Azerbajĝano aŭ Albanio, kion faras 125 el Latvio, 120 el Bulgario kaj 100 el Ĉeĥio aŭ Mongolio? Sekvas Litovio (50), Armenio (46), Bosnio-Hercegovino (36), Estonio (35), Makedonio (33) kaj Kazahio (23). Fine restas Moldavio kun 12 (supozeble unu generalo kaj unu oficiro kun siaj servistoj, ŝoforoj kaj kuiristo). Vere impona alianco, ĉu ne? Sed la bonvolaj registoj de tiuj landoj fiere povas diri: „Ni helpis liberigi la irakan popolon!” Ke pro tiu bonvolemo mortis dek-miloj da irakanoj kaj ankoraŭ ĉiutage suicid-atenculoj murdas ĝis 100 civitanojn aŭ eĉ pli multajn, tio ĝenas nek la usonan prezidanton nek liajn komplicojn. Ĉu neniu punos ilin?

Sincere via

Stefan MAUL

Enigmo

Eminenta flandra sonorilar-koncertisto malkovras verketon de italo kaj eldonas ĝin. Li sendas ĝin por recenzo al ruslanda hebreo elmigranta al Usono. Tiu ĉi sendas la verketon al usonano elmigranta al Aŭstralio. Tiu ĉi skribas la recenzon kaj sendas ĝin al revuo eldonata en Belgio. Tiu ĉi dissendas ĝin al cento da mondlandoj.

La tuta kanvaso okazas pere de unu sola lingvo – kiu ne estas la angla. Per kiu alia el la 9500 ankoraŭ vivantaj lingvoj tio okazis? Ĉu certas, ke per la angla lingvo tio povus okazi?

Dolĉan penson al la solvontoj.

Filippo FRANCESCHI
Italio

Genia ideo

Gratulojn Louis, genia estas via ideo *Propono al ĉiuj politikistoj* (MONATO 2007/2, p. 6). Kial prokrasti? Ili bruligu naciajn librojn, por rapidiĝi la aferon.

Danuta KOWALSKA
Pollando

Ateismo elracia, ateismo elvola

Gbeglo Koffi tuŝas (MONATO 2006/12, p. 26), kvankam eble sencele, homan kaj socian fenomenon. Li skribas: „Min oni konsideras ateisto, kiam en la sama medio mi diras, ke organiziĝi en grupo por havi komunan regularon nur por nei la ekziston de Dio signifas, ke oni neas ne la ekzistadon mem de Dio, sed la neadon de ĝia ekzistado.” Puŝite antaŭen, tiu subtila distingo troviĝas en kaj, eble, koincidas kun alivorta distingo konstatebla en la medio de ateistoj: ateistoj konvinkiĝintaj per elraciaj argumentadoj (konsentebaj aŭ ne) kaj ateistoj decidiĝintaj kontraŭ la ekzisto de Dio.

Kun la unuaj eblas interŝanĝi opiniojn kaj pridiskuti la kialojn inkludinantajn al ateismo; kun la duaj eblas nur interŝanĝo

de afablaĵoj kaj ekzamena elvidigo pri la psikologiaj kialoj absolutigantaj tiun sintenon.

Armando ZECCHIN
Italio

Kiu estas humanisto?

Kurioze sonas la invito de Paul Gubbins (MONATO 2007/2, p. 6) al Gbeglo Koffi eniri la rotojn de humanistoj. Kiu ne konsentus kun tiu invito? Sed strangas la implicita difino de humanisto, kiu, laŭ li, estas „tiu, kiu en sia vivo centras homojn, ne diojn; racion, ne superstiĉon; faktojn, ne fantaziojn”. Ĉu Thomas More kaj Erasmo (kaj cent mil aliaj) estis humanistoj senraciaj, fordonintaj sin al fantaziaĵoj? Krome: kiam intelektulo kaj nenaiva homo el skeptikeco aŭ dubemo ascendas al „dikredo”, kiel certas Gubbins, ke tiuj ĉi rezignis racion por fantaziaĵoj? Kaj ĉesis esti humanistoj? Ĝusta difino pri „humanisto” implicas uzadon de la tuta racio ĝisfunde. El tiu Gubbins-a difino pri „humanisto” likas, certe senintence, pli ol aplombo, io malrespekta al homoj sincere serĉantaj aŭ racimotivataj dikredantoj.

Armando ZECCHIN
Italio

Kiu estas humanisto? (2)

Responde al Paul Gubbins (MONATO 2007/2, p. 6) mi konstatas, ke mi estimas kaj religianojn kaj agnostikulojn. Nepre por ne esti fanatika kiel kristana kredemulo mi ĉe tiaj demandoj favore citas la biblion, por ke mi ne arĝu la veron al mi persone.

Eble la humanismo kaj humanisto centras homon kaj ne ian dion. Superstiĉon, do falsan kredon, ankaŭ serioza kristano ne centras, sed tre konscie evitas. Ankaŭ kun faktoj mi ne havas problemon. Sed la juda – kaj la biblia – realismo estas iom alia, ol faktoj. Ankaŭ tio ĉi estas konsiderebla kiel realisma:

Homoj jam iam rifuzis akcepti Dion kiel majstron. Ili mem volis esti tiaj. Sed esti bona majstro ankaŭ inkluzivas venki malbonon. Evidente ni estas malbonaj majstroj. Ĉiel la submetado de la tero al si ne signifas regadon.

Kaj tiuj, kiuj akceptas Dion tia, kiel majstro kaj ilia sinjoro same kiel amople-na patro? Ili mem ne estas sekuraj de sortobatoj. Jesuo ankaŭ asertis, ke lia regno ne estas de tiu ĉi mondo. Sed ili ankaŭ ne tiel facile detruigigas je trafo de malbono. Oni konstatis, ke delongaj fidemuloj pli facile resaniĝas de malsanoj, ekzemple.

Frieder WEIGOLD
Germanio

Unudimensia vidpunkto

La 15-jara datreveno de la disfalo de Sovetio estas bona preteksto por analizi tiun historian okazaĵon, kaj ates-tinto de tiuj eventoj Kalle Kniivilä, tiam troviĝanta en Moskvo, povus multon interesan rakonti pri tio. Sed, bedaŭrinde, anstataŭ *sia* vidpunkto (kion subkomprenas metado de lia artikolo en la koncernan rubrikon de la februara numero de MONATO), li publikigis simplan referaĵon de la libro de Jegor Gajdar, la unua kaj la plej maltalenta ĉefministro de Rusio en la postsovetia epoko.

La faktoroj, kiuj kaŭzis la pereon de Sovetio, estis pluraj kaj diverskarakteraj: ekonomiaj, politikaj, etno-naciaj, federaciaj (ekzemple diversnivela konfliktoj de la centraj kaj regionaj elitaj), kiujn analizi estas tre interese – sed komplike. Pri tio ekzistas jam granda literaturo. Tamen Gajdar interesiĝas nur pri la ekonomiaj, kaj ne la plej gravaj kaŭzoj, sed penas pruvi, ke ĝuste ili estas la ĉefaj. Tia unudimensia pritrakto de la temo taŭgas por Gajdar, des pli pro tio, ke lia ĉefa tasko estas senkulpiĝi sin pro la ekonomia kolapso, kiun elvokis liaj propraj metodoj gvidi la ekonomian vivon en la lando, sed por serioza ĵurnalisto senrezerve rerakonti sin-pravigajn primitivajn asertojn de fiaskinta politikisto estas tute ne serioze.

Nikolao GUDSKOV
Rusio

Ndlr.: Loki la artikolon en la rubriko „El mia vidpunkto” ne decidis la aŭtoro, sed la redakcio. Cetere, referenci al fakuloj supozataj aŭ veraj estas kutima metodo ĵurnalista.

La rubriko „Leteroj” estas malferma por koncizaj (maksimume 150-vortaj) reagoj de legantoj pri aktualaj kaj pri artikoloj aperintaj en MONATO. La redakcio faras propran elekton, post lingva kaj stila polurado. Letero, ankaŭ reta, estu subskribita per la nomo, kompleta stratadreso kaj telefonnumero. Per la sendo de la letero la aŭtoro donas sian permeson publikigi ĝin en la papera kaj en la reta versioj de MONATO. Leteroj por publikigo estu senditaj al leteroj@monato.net aŭ al MONATO, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.

Ĉu nova vetarmado?

de Stefan MAUL

La rusa prezidanto Vladimir Putin montris sin tre ĉagrenita. Dum la ĉi-jara sekurec-konferenco en Munkeno akre kaj laŭte li kritikis Usonon kaj Nord-Atlantikan Traktat-Organizaĵon (NATO). Li memorigis, ke NATO promesis ne loki avi-trupojn sur teritorioj de novaj (orient-eŭropaj) membroj-ŝtatoj, – ĝi ne plenumis tiun promeson. Li kritikis, ke NATO ankaŭ ne realigis la traktaton pri limigo de konvenciaj trupoj en Eŭropo. Al Usono li riproĉis, sen internacijura pravigo militi kontraŭ aliajn ŝtatojn (ekzemple Irakon). Krome la prezidanto avertis, ke NATO kaj Rusio komplete rezignis pri mezdistancaj kaj mallongdistancaj raketoj kun nukleaj eksplodaĵoj, sed ke nun Barato, Pakistano, Israelo kaj Norda Koreio aldonas al siaj arsenaloj ĝuste tiajn armilojn.

Malklara defend-sistemo

Aparte Putin atakis Usonon, asertante, ke Vaŝingtono detruas la strategian balancin inter la du ŝtatoj. Precipe li tiukampe kritikis la usonan planon por defend-sistemo kontraŭ longdistancaj, strategiaj raketoj, do tiaj, kiuj kapablas porti nukleajn eksplodaĵojn. Rusio en tio vidas evoluon, kiu povos protekti Usonon, sed samtempe ebligas al ĝi uzi sian propran strategian potencialon ofensive. Grava fakto ĉi-rilate estas ankaŭ, ke Usono ĝis nun ne ratifis la plej novan traktaton pri plia reduktado de nuklestrategiaj potencialoj.

Ĉiuj tiuj faktoj estas konataj, same konataj estas la kritikoj pri ili plurfoje eldiritaj en Moskvo. Sed Putin uzis la forumon de la mondvaste atentata sekurec-konferenco, por kompakte listigi tiujn okcidentajn (precipe usonajn) agojn ne konformajn al la intencoj de malarmado post la malvarma milito. Estis vera filipiko, kiu ne maltrafis sian celon, ĉar ĝi estis plejparte prava.



Usono asertas, ke la nova kontraŭraketa sistemo ne direktos sin kontraŭ Rusio, sed kontraŭ eventualaj evoluoj „en Irano kaj aliloke”. Ĉu vere? Irano ja disponas intertempe pri raketoj, kiuj kapablas flugi 1300 km, kaj baldaŭ eble ĝis 2000 km. Sed tiaj raketoj ankoraŭ ne taŭgas por atingi Eŭropon, des malpli Usonon. Por tion realigi, Irano bezonos minimume pliajn kvin jarojn. Kaj por instali en tiaj raketoj nukleajn eksplodaĵojn, Irano bezonos kromajn kvin jarojn. Se entute, por detruiri iranajn raketojn Usono devus instali sian defend-sistemon en suda Eŭropo, ne en Pollando kaj Ĉeĥio, najbare de Rusio.

Rusaj timoj

Moskvo do konsekvence modernigis sian strategian potencialon: ĝi evoluigis novan interkontinentan raketon (*Topol-M*), kiu kapablas flugi 10 000 aŭ eĉ 12 000 km kaj apenaŭ povus esti detruata per usonaj defend-raketoj. Usono ĝis nun parolis pri siaj planoj nek kun unuopaj aliancanoj, nek kun Rusio, nek (eĉ) kun

NATO. Estas do unuflanka projekto, kiun Usono pravigas per tiaj kaj aliaj argumentoj, tiel ke neniu scias konkrete, kion ĝi celas. Se Usono vere timas iranajn nukle-atakon, la temo devas esti diskutata en NATO kaj kun Rusio, kiun ja same povus atingi iranaj raketoj.

Mi ne vidas ion alian por karakterizi tiun ĉi evoluon, ol timi novan vetarmadon. Se ĝi daŭras, ni baldaŭ denove alvenos al la fifama „ekvilibro de hororo”, bone konata el la epoko de malvarma milito. Horora imago! Iom konsolas nur, ke ĝis nun la plej multaj testoj por la usona raket-defenda sistemo fiaskis. Eble ja temas nur pri ĥimero. Ĉu vi memoras, ke antaŭ multaj jaroj Usono jam havis similan, eĉ pli ambician planon? Tiam ni duonmoke parolis pri „stel-milito”. Kiam montriĝis, ke nek teknike, nek finance oni povis realigi tiun frenezaĵon, senbrue oni entombigis ĝin. Sed ĉar neniu scias precize, ĉu la nuna plano eble tamen povus realigi, aliaj registaroj reagis per propra vetarmado. Atendas nin maltrankvilaj jaroj. ■

La angla: triumfas banaleco



BOB FREUND

Alilandanoj ofte miras, ke la plimulto de la irlandanoj preferas la anglan ol la gaelan (irlandan), kiu laŭkonstitucie estas la unua oficiala lingvo de la Irlanda Respubliko. Ŝajnas strange, ke popolo, kiu jam en frua epoko havis altan kulturon, hodiaŭ turnas sian dorson al sia idiomofavore al la lingvo de la angloj, kiuj invadis ilian teritorion kaj okupis ĝin ĝis la 20a jarcento. Nun la junaj generacioj estas influataj ne tiom de Anglio,

kiom de Usono. Do la premo kontraŭ la indiĝena irlandana kulturo estas eĉ pli forta.

La akcepton de la lingvo de alia popolo kaj la hegemonion de la angla kritikis la prestiĝa irlandana ĵurnalo *The Irish Times*. Paradoxse, la ĵurnalo estis fondita en 1859 de brita armea oficiro. Dumlonge ĝi estis rigardata kiel la voĉo de la konservativaj kaj protestantaj angleparolantaj uniistoj, kiuj kredis, ke Nord-Irlando (kaj aliaj teritorioj re-

gataj de Britio) restu parto de la brita regno. La unua katolika redaktoro estas nomumita en 1985, kaj ekde tiam la ĵurnalo estas legata en ĉiuj sektoroj de la edukita socio.

Iluzioj

La menciita artikolo portas la titolon *Dek du modernaj iluzioj kontestendaj*. La kvina iluzio pritraktas la aserton, ke bonveniga estas la disvastiĝo de la angla kiel monda lingvo. Laŭ la aŭtoro: „La praktika avantaĝo de tio, ke ekzistas unu komuna funkcia lingvo de komerco, administrado kaj aviadila trafiko, estas evidenta.”

Tamen li daŭrigas: „Sed la superpergado de la angla estas akompanata de kultura aroganteco, kiu malnobligas, neglektante aliajn lingvojn kaj kulturojn; kaj de kombinaĵo de anglosaksa politika kaj socia aroganteco, kune kun kolapso de intereso en angleparolantaj landoj pri aliaj popoloj kaj lingvoj: sume, triumfo de banaleco super diverseco.”

Garbhan MacAoidh



KATHERINE THE TRAVELLER

En la jerusalema kvartalo Mea Ŝearim okazas, kun plej religia fervoro, debato pri kiel pasigi la sabaton.

ISRAELO

Solvo ne tute ortodoksa

Judismo malpermesas uzi elektron sabate kaj festotage. Ortodoksaj judoj solvas tiun problemon, uzante ekzemple aŭtomatan horloĝon, kiu mem en- kaj el-ŝaltas elektron dum tiuj tagoj. Tamen la plej ortodoksaj loĝantoj en la jerusalema kvartalo Mea Ŝearim preferas neniel uzi elektron.

Nun ŝajne la problemo estas solvita. Loĝanto de la ortodoksa kvartalo produktas tiel nomatan koŝeran

elektron per generatoro, kiun enŝaltas arabo. La koŝera generatoro provizas sabate ĉirkaŭ 500 familiojn kaj unu sinagogon per elektro.

La ŝtata elektra kompanio nun ellaboras planon por tiel koŝere elektrizi jerusalemajn religiajn kvartalojn. Varbotaj estas 150 nejudoj, sed estiĝis nova problemo. Ĉu ortodoksaj rabenoj permesos al judoj sabate estri tiujn ĉi nejudojn?

AMik

Birdo de la jaro



Estis serena, trankvila malfrusomera antaŭtagmezo. Subite la elektra lumo flagris. Tra la fenestro ni vidis leviĝantan fumnubon proksime de nia domo. Poste ni vidis rostitan turfalkon en masto de alttensia konduktilineo. Eble ĝi postflugis pasejon kaj tuŝis elektrajn dratojn. Tuj la birdo mortis.

Pli da bonŝanco havis turfalkino, kiu rompetis al si flugilon. Ni trovis ŝin en heĝo de nia ĝardeno. Najbaro transdonis ŝin al ĉasisto, kiu zorgis pri ŝi. Unu monaton poste la birdo povis denove flugi.

La turfalko estas la plej ofta rabobirdo en Aŭstrio. En Eŭropo vivas 350 000 paroj. Tiu ĉi adaptiĝema birdo ne timas homojn, tamen la nombro malkreskas pro reduktiĝantaj vivmedio kaj ebloj nutri sin. Tial la organizaĵo *Birdovivo Aŭstrio* kaj la Germana Asocio pri Naturprotekto deklaris la turfalkon Birdo de la Jaro 2007.

Vivmaniero

La turfalko vivas en altaj arboj, turoj, mastoj kaj simile altaj konstruaĵoj. Falko ne mem konstruas neston, sed reuzas tiun de korvo. Ĉar falko estas tro malforta por forpuŝi korvon, ĝi uzas forlasitan neston de la pasinta jaro. La ino alvokas la viron al pariĝo. Meze de aprilo ŝi demetas tri ĝis ses ovojn, kiuj longas 4 cm. La idoj eloviĝas post 28 tagoj. Dum la unuaj tagoj ŝi protektas la birdidojn sub siaj plumoj. Poste la gepatroj serĉas nutraĵon por la idoj. Dum la tria vivsemajno ili ekhavas jam la mason de plenkreskuloj. Turfalkoj povas vivi maksimume 16 jarojn.

Turfalko volonte manĝas musojn, talpojn, lacertojn kaj insektojn. Por ilin ĉasi ĝi ŝvebas alte en la aero. Poste ĝi fale alpuŝiĝas al sia viktimo. Por kapti muson ĝi foje devas flugi 3 km.

Alia ĉasmaniero estas la kaptado de flugantaj malgrandaj birdoj.

Aspekto

La latina nomo *Falco tinnunculus* venas de la tintanta kriado de la birdo: ti! ti! ti! Ekzistas pli ol dek tiaj „vortoj”. Starante, birdoj de ambaŭ seksoj altas 35 cm; la etenditaj flugiloj estas kune 75 cm larĝaj; la maso estas 200 gramoj. Rimarkindaj estas la diversaj aspektoj laŭ koloro: la kapo de la vira birdo estas helgriza, de la ina ruĝ-bruna. Ĉar la kolspino konsistas el 15 vertebroj, la birdo – tipe por falkoj – povas turni la kapon 180 gradojn.

Ĉar oni markis la birdojn per ringoj, oni scias la migradvojojn. Kelkaj travintras en Eŭropo, se kaptblas sufiĉe da musoj. Aliaj ŝanĝas sian loĝregionon nur iomete. Aliaj forflugas aŭtune pli

Turfalko en la ĝardeno de la aŭtoroj.



La turfalko aperas poŝtmarke kun sia esperanta nomo.

suden kaj restas en la tropika pluvarbaro, kiam en Eŭropo malvarmas.

Walter, Renate, Irene, Stefan KLAG



POLICO

Fotile kaptitaj

En januaro 2007 la albana polico fariĝis 90-jara. Temas pri la polico de la sendependa albana ŝtato fondita en 1912. Tiam, post 500 jaroj sub otomana jugo, la nova ŝtato frontis al anarĥio. Ekzemple, ŝtelistoj prirabis kaj terurigis la popolon. Pro tio necesis polico por establi publikan ordon.

Kaptitaj en rara foto estas tiamaj policistoj. Meze, apogite kontraŭ la muro, estas mortinta ŝtelisto, kiu surhavas mallongan fustanelon. Ĉi tiu estas karakteriza albana plurfalda jupo, kiu ebligas facile kuri kaj eskapi el la manoj de ĉasantoj. Ĝi estas grizkolora kaj ŝmirita per graso, por ke ĝi estu ne rimarkebla kaj rezistu al humideco.

Bardhyl SELIMI



Ĉiun novan jaron ankaŭ en Albanio oni eksplodigas fajraĵojn. Kvankam ankoraŭ relative malriĉaj, albanoj elspezas multe da mono pro aĉeti fajraĵojn, kiuj tamen endanĝerigas vivojn. Ĉiam dum la novjara periodo hospitaloj plenplenas de brulvunditoj. Okazas ankaŭ incendioj. La foto, farita la 1an de januaro 2007, montras la postrestaĵojn de piroteknikaĵoj eksplodigitaj surstrate en loĝkvartalo de Tirano.

Bardhyl SELIMI

Ŝanĝiganta feliĉo-festo

La printempa festo estas la plej grava kaj movoplena festo de la ĉina popolo. Ĝi estas novjara festo laŭ la luna kalendaro kaj okazas la unuan tagon de la unua monato de tiu ĉi kalendaro. En 2007 la printempa festo okazis la 18an de februaro en la jaro de la porko, laŭ la ĉina kulturo.

La printempa festo fontas el la kultado de dioj kaj prapatroj antaŭ ĉirkaŭ 3000 jaroj. Ĝi anoncas la alvenon de printempo, la refreŝiga periodo, kiam komenciĝas nova sezono de semado kaj rikoltado. De la 23a ĝis la 30a de la lasta monato de la luna kalendaro okazas „tagoj por bonvenigi printempon” aŭ „tagoj por purigado”. Kutime ĉinoj purigas siajn hejmojn antaŭ la printempa festo.

Dum 10 tagoj antaŭ la festo familioj aĉetadas, ekzemple kortobirdon, fiŝaĵon, viandon, teon, drinkaĵojn, spicaĵojn, nuksojn, sukeraĵojn, fruktojn ktp. Krome ili preparas donacojn: novajn vestaĵojn por la infanoj. Cetere, dum tiu ĉi periodo ili gluas novjaran versparon sur la pordon de la loĝejo por esprimi bondezirojn. La versparo estas skribita sur ruĝa papero. Apudporde pendas granda ruĝa lanterno, kaj sur la pordklapo legeblas papero kun ideogramo signifanta „feliĉo”.

Besto

Laŭmite aperas jarfine minacanta besto. Ĝi estu forpelita per petardoj: eksplodigi fajraĵojn fariĝis do kutima printempfesta amuzaĵo. Sed temas pri tempo ne nur por petardoj, sed ankaŭ por familiaj renkontiĝoj. Dum la tiel nomata jarfina vespero familianoj kuniĝas por ĝui bongustaĵojn: tiuj, kiuj laboras for de la hejmo, revenu antaŭ



Printempa festo 2006 en la centra placo de Junĉeng

la festo.

Ĉe la unua kokeriko kaj la sonado de sonorilo, familianoj eksplodigas siajn petardojn. Ĉiu surmetas novajn vestaĵojn, salutas la maljunulojn kaj donacas monon al la infanoj. La unuan novjaran tagon oni kunmanĝas; la duan vizitas amikojn kaj parencojn. Surstrate oni dancas kaj paradas.

„Riĉiĝon!”

Tamen la festo ŝanĝiĝas. Dum maljunuloj kaj mezaĝuloj ankoraŭ flegas tradicion feston, junuloj volas kartludi, interretumi aŭ simple malstreĉiĝi kaj eskapi la premojn de la ĉiutaga vivo. Kelkaj junuloj eĉ ne hejmeniras por festi kun siaj gepatroj. Anstataŭ per-

sone saluti per tradicia „Riĉiĝon!” aŭ „Gratulon!”, ili sendas telefonajn aŭ elektronikajn mesaĝojn. Pli da familioj ferias dum la festperiodo, elektante hotelojn anstataŭ la propra hejmo.

Laŭ sondaĵo, 81 % de ĉinoj opinias, ke la tradicia printempa festo estu transdonita de generacio al generacio. Preskaŭ samnombre ili kredas, ke kelktaga printempa feriado utilas al familieco kaj socia harmonio. Tamen jam velkas la tradicioj. Malpli oni atentigas manĝaĵojn kaj novajn vestaĵojn. Pli oni atentigas homan kontakton. Kaj estas aliaj, kiuj vidas en la printempa festo manieron akceli konsumadon kaj stimuli ekonomion.

CHEN Lina/pg



Kontribuojn por la rubriko *Moderna Vivo* de MONATO kunlaborantoj sendu al moderna_vivo@monato.net.

MAKEDONIO

Printempa etoso ĉe la lago de Ohrid

Makedonio – la malgranda respubliko de eksa Jugoslavio, najbara al Albanio, Kosovo, Bulgario kaj Grekio, nun travivas „printempon” en la figura senco de tiu vorto. Loĝata de pluraj etnoj, ĉefe makedonoj, albanoj, serboj kaj grekoj, ĝi konstante altiras la atenton ne nur de la respektivaj ŝtatoj najbaraj, celantaj protekti la rajtojn de siaj sametnanoj, sed ankaŭ la atenton de la internacia komunumo. Pri tio atestas ankaŭ tio, ke Milošević ne aŭdacis malpermesi

la sendependiĝon de Makedonio en la jaro 1991, kiel li faris rilate al Slovenio, Kroatio kaj Bosnio-Hercegovino, kaj ankaŭ poste rilate al Montenegro kaj Kosovo. Ankaŭ nuntempe oni klare konstatas, ke Eŭropa Unio (EU) kaj Usono faras ĉion eblan, por ke neniu tuŝu la memstarecon kaj stabilecon de tiu lando. Antaŭ nelonge Makedonio komencis interparolojn por aliĝi al EU.

Tutjare la landon vizitas turistaj grupoj el Albanio, Kosovo, Bulgario kaj Grekio. Dum mia vizito al Make-

donio komence de marto ĉi-jare, mi vidis plurajn, kiuj loĝis en hoteloj ĉe la bordo de belega lago de Ohrid. Bulgaroj kaj grekoj venas ĉi tien por viziti la monaĥejojn (Sankta Naumo, Kaliŝte kaj aliaj), same kiel la kastelon kaj malnovan urboparton sur la monteto en Ohrid (iama ĉefsidejo de regantoj bulgaraj kaj bizancaj). En la malnova urboparto ĉe la lago elstaras tre malnova monaĥejo el la 11a jarcento, dum en Kaliŝte estas preĝejoj el la 14a jarcento. En la monaĥejo Sankta Naumo, situanta proksime al Ohrid, oni ekspoziciis famajn ikonojn mezepokajn, kreitajn de albanaj pentristoj.

Albanoj venas ĉi tien por ferii kaj pasigi semajnfinojn, kaj ankaŭ por ĝui la trankvilecon de tiu regiono, situanta je 800 metroj super la marnivelo, kaj enspiri la freŝan kaj puran aeron de Ohrid, ĉirkaŭata de altaj montoj kovritaj de neĝo. Ili venas ankaŭ aĉetadi en la bazaroj de urboj Ohrid kaj Struga, kie la prezoj estas relative malpli altaj ol en Albanio. Nelaste ili vizitas Ohrid ankaŭ por frandi la tre bongustan fiŝon *Koran*, vivantan nur en tiu lago. Oni dire en la antikveco Dar, reĝo de Persio, volis manĝi tiun fiŝon ĉiutage kaj ĉevalrajdistoj stafete liveradis ĝin al li en malpli ol 24 horoj.

Albanoj senprobleme vizitas ankaŭ monaĥejojn kaj aliajn sanktejojn ortodoksajn. Ĉe la monaĥejo Sankta Naumo ili ĝuas ankaŭ la navigadon per boato laŭ rivereto ĉe la lago mem. Ĝin prizorgas Nikola, simpatia kaj bonhumora makedono. Li akompanas plurajn grupetojn de fremdaj turistoj el pluraj landoj, pri kio li rakontas dum la duonhora navigado. Nikola kantas kantojn



makedonajn, albanajn, italajn kaj anglalingvajn por agrabli la akompanon.

Tute proksime al la makedona-albana landlimo, sed sur albana teritorio, troviĝas la beleta duoninsulo Lin, sur kies monteto videblas spuroj de pli ol 3000 jarojn aĝa civilizacio. Tie troviĝas interalie ankaŭ la tombo de Bardhyl, reĝo de la iliria gento de la enkelejtejanoj. Multaj arkeologiaĵoj troviĝas ankaŭ ĉe la lagobordo, apartenanta al Albanio (apud la urbo Pogradec).

En la jaro 2001 eksplodis vera milito de makedonoj kontraŭ ribelantaj albanoj, kiuj kompakte loĝas en okcidenta Makedonio. Tamen finfine oni trovis kompromison per la Interkonsento de Ohrid, laŭ kiu albanoj ekĝuis pli da rajtoj kaj la albana lingvo iĝis oficiala en la lokoj, kie ĝiaj parolantoj estas pli ol 20 elcentoj de la loĝantaro.

Se oni parolas pri notinda progreso tiurilate, unue menciindas, ke estis oficialigita la albanlingva Universitato de Tetovo. La homoj laboras kaj komunkiiĝas pace kaj amike. Tamen okulfrapas, ke ĉiam ankoraŭ la dungitoj en oficejoj (eĉ en poŝtofacejo, doganejo kaj hoteloj) parolas nur makedone, ankaŭ en la urbo Struga, loĝata plejparte de albanoj. Ekzemple ĉe la akceptejo de la hotelo Drim en Struga, ne estas ŝildo nur en la albana lingvo. Ĉe la makedona-albana limo oni



MILADEN JABLANSKIĆ

avertas pri „danĝera areo” nur makedone kaj angle, neglektante la fakton, ke tien iras plejparte ankaŭ albanoj. Nur unu albanlingva ĵurnalo estas vendata en la gazetkioskoj, kaj apenaŭ estas albanlingvaj programeroj en la loka televida stacio. Tamen se vi surstrate alparolus albane vendistojn,

kafejistojn kaj lokulojn, vi certe ricevos respondon kontentigan.

Tre gravas, ke tiu pluretna respubliko plu estu stabila kaj forta, ĉar tiamaniere oni kontribuos al paco kaj amika kunekzistado sur la malsekura balkana duoninsulo.

Bardhyl SELIMI



RICHARD G

KERSTIN WICHMANN


Kapti la malgrandajn momentojn



Kerstin Wichmann: memportreto.

La preferata bildo de Kerstin Wichmann, fotita el la mano, kun obturila rapido de 1/90 de sekundo.


En la venontaj numeroj **Monato** prezentos al vi verkojn de kelkaj elstaraj fotantoj, ĉu profesiaj, ĉu amatoraj, kiuj per siaj verkoj iel „frapis” la redaktoron. Kial iu foto aparte tuŝas la rigardantojn kaj alia ne? Nu, la respondo estas relative malfacile donebla. Jen povas temi pri frapaj koloroj, jen pri nekutima rigardo-angulo, jen pri aparte bela fotita persono aŭ objekto ... **Monato** povos prezenti en siaj paĝoj nur kelkajn fotojn, sed ĉiam estos donita la retadreso, kie vi povos trovi pli da bildoj de la prezentata aŭtoro.



Lavejo, fotita per FinePix F810.



Glacio, fotita per FinePix 2600 Zoom, fulmilo enŝaltita.



*La foto Du enuataj infanoj,
kiu kaptis la atenton de Monato.
La malpleneco de la ĉambro
ankoraŭ emfazas la solecon
de la junuloj.*



En tiu ĉi unua artikolo Monato prezentas la verkaron de sinjorino Kerstin Wichmann, kiu loĝas en Stadland, malgranda germana vilaĝo, kun sia amiko Mario kaj siaj du gefiloj Marcel (baldaŭ 18) kaj Jessica (13). Pri si mem Kerstin Wichmann skribas: „Mi fotas, ĉar mi tre ŝatas kapti malgrandajn momentojn. Mi amas rigardi bildojn denove kaj denove kaj rememori.” Ŝi plej ŝatas makrofotadojn de floroj aŭ aliaj objektoj, kaj la bildo Kandellumo estas ŝia plej ŝatata.

Kerstin Wichmann uzas nun la ciferecan aŭtomatan fotilon FinePix Z3 kun triobluga optika zomobjektivo kaj kun diseriĝo de 5,1 megapikseloj. La granda avantaĝo estas ĝia malpezeco (nur 130 g!), sed la neeblo fiksi ĝin al stativo estas laŭ Kerstin grava manko.

Se ankaŭ vin ravas la fotoj de Kerstin Wichmann, vi povas trovi kelkcenton da aliaj en <http://www.flickr.com/photos/patrino/sets>. ■



La filino Jessica post (laŭ ŝi) enua ekskurso.

Libelo, fotita per FinePix 2600 Zoom kun uzado de fulmilo.



Rano.



EŬROPA UNIO

Semajno pri neelĉerpigonta energio

Foto-elektra centralo en Barcelono

De la 29a de januaro ĝis la 2a de februaro 2007 en la belga ĉefurbo Bruselo (kaj etskale ankaŭ en franca Grenoble kaj hispana Murcia) okazis prelegoj kaj diskutoj pri inteligenta uzo de energio. La aranĝon organizis la Eŭropa Komisiono (EK) kaj kelkaj ĝiaj agentejoj. Estis forumo, kie eŭropaj oficistoj, sciencistoj kaj reprezentantoj de la industrio povas interŝanĝi ideojn. Estis la unua tia semajno, kaj ĝi estonte verŝajne okazos ĉiujare.

La eŭropaj instancoj kaj la kunlaborantaj sciencistoj prezentis la kurantajn kaj estontajn projektojn, por kiuj disponeblas subvencioj. La industrio klarigis sian vidpunkton pri la sekvotaj vojoj. Ĉar pluraj aranĝoj okazis samtempe, mi povas raporti pri nur kelkaj eroj.

Urba publika transporto

Ĝis nun EK ne multon entreprenis rilate al urba publika transporto, ĉar laŭ

la tiel nomata „subsidiar-principo”¹, EK ne interveni pri aferoj, kiuj plej bone povas esti farataj sur landa aŭ loka nivelo. Tamen ekestas ĝenerala deziro por havi pli da eŭroprivelela reguligado. Ekzemple busoj reprezentas nur malgrandan parton de la tuta merkato de transportiloj, kaj se ĉiu urbo aparte lanĉas mendojn laŭ la propraj kriterioj pri komforto, motoroj, dimensioj ktp, la merkato ankoraŭ pli dispeciĝas. El tio rezultas pli altaj prezoj kaj malpli alta

kvalito. Pli bone estus interkonsenti sur eŭropa nivelo pri bazaj aferoj.

La brusela diskuto okazis prepare al la aperigo en aŭtuno 2007 de „verda libro”, tio estas diskutdokumento, en kiu EK prezentos temojn kiel tarif- kaj pag-sistemoj, mezurado de kvalito, propulso-sistemoj, minimumaj servoj, kiun ĝi deziras trakti eŭroprivele. Ĉiuj civitanoj rajtos sendi siajn rimarkojn pri tiuj proponoj.

Uzo de energio en konstruaĵoj

Jam de jardeko EK pristudas metodojn por igi la publikajn kaj privatajn konstruaĵojn malpli energivoraj. Nun la preparaj laboroj finiĝis, kaj aro da normoj, informoj kaj helpiloj estas preskaŭ pretaj por enkonduki veran agadplanon. Oni unuavice celos grandajn konstruaĵojn, ĉar ili estas plej facile mastrumeblaj kaj liveros plej rapidajn kaj grandajn ŝparojn. Antaŭvideblas, ke jam post kvin jaroj

sur ĉiu tia konstruaĵo estos ŝildo, komparebla al la jam ekzistanta ŝildo sur kelkaj kategorioj de hejmaj aparatoj en eŭropaj vendejoj, kiu montras al la publiko, kiom ŝparema la aparato estas. Io simila venos por privataj loĝejoj, kvankam ĝi ne estos publika, sed nur montrenda ekzemple okaze de luo aŭ vendo de domo.

Multo restas farenda. Necesas plidetaligi la metodojn por kalkuli la energikonsumon kaj difini la energikategorion, kaj necesas trejni kaj agnoski teknikistojn, kiuj kapablas fari tiajn kalkulojn. Pluraj retejoj jam donas informojn: ec.europa.eu/energy/intelligent/index.en.html kaj www.buildingsplatform.eu estas la EK-paĝoj pri la temaro; www.eplabel.org estas paĝo de privata firmao, kiu montras, kiel povus aspekti la ŝildo. Ĝis nun la informoj estas preskaŭ nur en la angla lingvo, sed oni promesas tradukon al deko da aliaj lingvoj.

La rolo de elektro

Tiun kunvenon organizis *Eurelectric*, la unuiĝo de la eŭropa elektroproduktanta industrio (www.eurelectric.org). Elektro kovras proksimume (dependas de la kalkulmetodo) duonon de la tuta energibezono; nukleaj centraloj liveras trionon de la elektro. Grava nuntempa problemo estas la ofta saturiĝo de la interkonektoj, de la grandaj alttensiaj lineoj kaj de la gasoduktoj, kiuj ligas landojn kaj regionojn. Tio malhelpas konkurencon kaj igas la Eŭropan Union (EU) vundebla, kiam okazas katastrofo. La prelegantoj substrekis la bezonon plu atenti pri ekvilibro inter konkurencopova kostprezo, fidinda provizado kaj daŭrigebla produktado, elektanta neelĉerpiĝontajn energifontojn.

En printempo 2007 *Eurelectric* publikigos la rezultojn de dujara studo pri la rolo de elektro, por atingi tiun ekvilibron je mezlonga (2030) kaj longa (2050) tempo. Temoj

en la studo estos inter aliaj ŝparo de elektro kiam eblas, prefero por elektro, kiam ĝi plej efikas (ekzemple en transporto), kaj nova atento pri karbo por elektroproduktado, ĉar tiu energifonto havas plej stabilan prezon kaj ĝia uzado ne nepre estas polua.

Inteligenta energio

EU subtenis kaj subtenos projektojn por pli inteligente uzi energion. Interesa jam uzebla realigo estas www.topten.info, kiu listigas por deko da landoj la dek plej efike funkciajn hejmajn aparatojn. En 2007 ekos nova subvenciprogramo, kies detaloj aperos ĉe ec.europa.eu/energy/intelligent/index.en.html. La programo ne subtenos teknologion, sed klopodos plibon-

igi la konduton de la civitanoj. Projektoj havu partnerojn en pluraj EU-ŝtatoj. Samloke estas ankaŭ informoj pri pasintaj aŭ daŭrantaj projektoj.

Konkludo

La semajno² montris la vojojn, kiujn la EK kaj la industrio emas iri rilate al energi-politiko. La interŝanĝo de ideoj certe helpas por kongruigi la vidpunktojn. Kvankam la aranĝo estis malfermita al ĉiuj, en realo la ĉeestantaj „ordinaraj“ civitanoj estis raraj. Parte ili estis reprezentataj de premgrupoj, kiuj elstarigas nur siajn ideojn kaj silentas pri kontraŭaj opinioj. Tamen, per iniciato kiel „verda libro“ ĉiuj ankoraŭ havas ŝancon esprimi sian opinion.

Roland ROTSART


1. Subsidiar-principo: laŭ tiu principo ĉiu supera unuo de socio kaj ŝtato devas plenumi nur tiujn taskojn kaj uzi nur tiujn rajtojn, kiujn la suba unuo ne kapablas realigi, sed ĉiam la supera unuo devas ebligi (helpi) al la subaj unuoj mem laŭeble bone plenumi siajn taskojn kaj apliki siajn rajtojn.

2. www.eusew.eu estas la ĉefpaĝo de la semajno. Kiel la aliaj paĝoj, ĝi estas preskaŭ ekskluzive anglalingva.

Vent-elektra centralo en Tarifa



ELENA ROMERA



Reĝisoro: Alejandro González Iñárritu

Scenaro: Guillermo Arriaga

Aktoroj: Brad Pitt, Cate Blanchett, Rinko Kikuchi, Adriana Barraza kaj aliaj

142 min. / Usono / 2006

FILMO

Babel

La meksika reĝisoro Alejandro González Iñárritu [injáritu] scias, kiel li devas kapti sian publikon. Dum 142 minutoj – filmo de du horoj kaj duono estas escepta – li kaptas la atenton de la spektantoj.

Papilia teorio

La rakonto disvolviĝas ĉirkaŭ la teorio de la ĥaoso. Se papilio ekflugas en unu kontinento, povas esti, ke la venteto kreita ĉiam ade fortiĝas kaj finfine en alia kontinento kaŭzas cunamon. Estus malsaĝe malkaŝi al vi, kio aŭ kiu estas la papilio en tiu ĉi filmo, ĉar nur en la lastaj minutoj de la rakonto la spektanto konstatas, kio en tri kontinentoj kaŭzis ĉion, kio estas montrata en la filmo.

Yusef kaj Ahmed, du marokaj knaboj, kies patro ĵus aĉetis pafilon, enuas dum la ŝafpaŝtado kaj decidas iom provi la armilon. Hazarde ili trafas usonan turistinon (Cate Blanchett), kiu vojaĝas en aŭtobuso. La virino estas severe vundita, kaj ŝia edzo (Brad Pitt) portas ŝin al najbara vilaĝo. Tie ili atendas helpon, sed la sola preta kaj kapabla iom helpi estas loka berbera veterinaro. La usona ambasado sciigas, ke la pafon lanĉis marokaj teroristoj, kaj ke sendado de ambulanco nenecese endanĝerigus la vivon de la flegista skipo.

Samtempe ni ekscias, ke la infanoj de la usona paro estas ĉe meksika vartistino (Adriana Barraza) en San-Diego, kaj ke ŝi – pro la akcidento – devas varti ilin multe pli longe ol antaŭvidite. Ŝi decidas kunporti la infanojn al Meksiko, kie edziĝos ŝia filo, okazaĵo, kiun ŝi ja ne volas maltrafi. La revenvojaĝo al San-Diego tamen disvolviĝas ne kiel planite. La hiperlaborema usona limgardistaro ne pretas kredi, ke ŝi estas la vartistino, kaj arestas ŝin pro kidnapado de usonaj infanoj.

En tria mondparto, Azio, japana surdmuta adoleskulino (Rinko Kikuchi), kiu daŭre luktas kun la fakto, ke ŝia patrino memmortigis sin, sopiras je iom da atento. Unuavide la spektantoj ne komprenas, kiel tiu rakonto interplektiĝas kun la du aliaj rakontoj, sed finfine la puzzle ja kompletiĝos.

La fatala momento

González Iñárritu ĉiam estis fascinita de la fakto, ke unusekunda ago povas komplete ŝanĝi homan vivon. En lia antaŭa filmo *Amores perros* (Hunda amo) tio estis la sekundo, en kiu tri aŭtoj koliziiis unu kun alia, en 21



Chieko (Rinko Kikuchi), surdmutulino, ne sukcesas kompreni, kial ŝia patrino mortis.

Grams (21 gramoj) la momento, kiam patro kun siaj du infanoj havas akcidenton. En *Babel* (Babelo) temas pri tiu unu pafo, kiu ne estas lanĉita pro malamo aŭ politikaj motivoj, sed dum infana ludo.

Babelo

Pri la signifo de la titolo eblas iom filozofi. Unuflanke la filmo estas plurlingva. Ĝi ne estas la kutima usona kliŝo, en kiu francoj, germanoj, hispanoj kaj aliaj ĉiuj parolas la anglan. Ne, la marokanoj parolas berbere kaj arabe, la turistoj france kaj kelkaj angle, la vartistino dum la nupta ceremonio parolas kun ĉiu hispane, la japanoj japane kaj la japana knabino eĉ la japanan gestolingvon.

Sed la babela konfuzo ne estas nur lingva. En la maroka rakonto la edzo de la pafita virino ne havas problemojn lingve komprenigi sin, sed emocie li ne povas transigi siajn sentojn al siaj kunvojaĝantoj. Tiuj volas kiel eble plej rapide forvojaĝi kaj lasi la paron sola en la berbera vilaĝeto. La meksika vartistino vane provas komprenigi al la usonaj limgardistoj, ke ŝi konas la infanojn ekde ilia naskiĝo kaj neniel havas malbonajn intencojn. Kaj en Japanio la patro de la adoleskulino nur konstatas, ke li ne plu komprenas sian filinon, malgraŭ la komuna lingvo.

Se vi legos plurajn recenzojn pri *Babel*, vi konstatos, ke tre multaj laŭdegas ĝin kaj nomas ĝin grandioza kreaĵo nepre vidinda. Tion konfirmas ankaŭ la faktoj, ke la filmo ricevis la *Oran Globon* kaj ke Alejandro González Iñárritu en Cannes ricevis la titolon de la plej bona reĝisoro. Aliflanke vi vidos, ke pluraj trovas la filmon enua, malinteresa, ne spektinda. Ĝajne en iuj nederlandaj lokoj, kie la filmo aperis komence de la jaro, duono de la ĉeestantoj forlasis la kinejon antaŭ la fino de la filmo. Ĉu ruba aŭ rava filmo? Nu, por povi mem juĝi, vi rigardu ĝin!



Richard (Brad Pitt) travivas koŝmaron en sia babelo.




Paul PEERAERTS

Susan (Cate Blanchett) estas mortpafita kaj luktas kontraŭ la morto.



Kontribuojn por la rubriko *Arto* de MONATO kunlaborantoj sendu al arto@monato.net.

Ruza leporo kaj ĉiuj aliaj



Ĉu vi multon scias pri literaturo en Esperanto el Afriko? Verŝajne, ne. Se vi kapablos rememori tuj senpripense pli ol du librojn aŭ aŭtorojn el la granda kontinento, vi estas neordinara erudiciulo. Ĉiokaze librojn devenantajn de tie eblas kalkuli per fingroj de la manoj sen helpo de la piedoj. Do rilate esperantlingvan literaturon la nigra kontinento estas blanka makulo.

Kaj jen aperis la aŭtentike afrikdevena libro (presita, tamen, en Pollando): la libro, kies aŭtoroj, kvankam loĝantaj kaj agantaj en Kameruno, konsistas pri ties komunafrika esenco. Ĝi konsistas el elektitaj kaj prilaboritaj de la aŭtoroj popolaj rakontoj – entute dek kvin, pri kiuj amuzis sin vilaĝanoj dum jarcentoj kaj jarmiloj vespere, post fino de laboroj, kaj el kiuj ili ĉerpis sciojn pri la mondo kaj sociaj moralaj valoroj. Post ĉiu rakonto estas komento de la aŭtoroj pri tio, kiun moralan instruon la rakonto devas havi. Krome, fine de la libro estas prezentita kolekto el dek proverboj, en akompano de klarigoj pri kulturaj specialaĵoj kaj ĝenerala signi-

fo, kiujn la proverboj havas. Do estas folkloro, komentata de la homoj, kiuj mem apartenas al tiu popola kulturo, kiun la aŭtoroj komentas. Por kompreni la prezentatan kulturon tio estas tre grava.

La libro estas aranĝita por du celgrupoj. Unue, por infanoj, kiuj ĉie en la mondo ŝatas fabelojn pri la bestoj. Due, por plenkreskuloj, kiuj interesiĝas pri la afrika kulturo kaj per prezentataj folklorajoj volas kompreni apartaĵojn de ĝi, ĝiajn valorojn, samecon kaj malsamecon al kulturoj de aliaj partoj de la mondo. La duan taskon la libro plenumas tre bone – ne nur per la rakontoj mem, sed ankaŭ per lingvaĵo, uzo de apartaj vortoj ktp, pri kio ili mem ja ne pensis.

La ĉefa ideo, kiu, laŭ la aŭtoroj, troviĝas en la kerno de la afrika folkloro, estas la tri ĉefaj tipoj de homoj (prezentataj en la rakontoj kiel certaj bestoj): *la saĝuloj, ruzuloj kaj idiotoj*. La rilatoj inter tiuj tri ĉefaj karakteroj, sukcesoj kaj fiaskoj en karakterizaj kondutoj de ili estas la esenco de la enhavo. Nu, prezento de la homoj kiel bestoj en folkloro estas fenomeno tutmonda. Sed la tradicioj, kiu besto respondas al kiu homa trajto, estas ege malsamaj. Ekzemple, en la eŭropa folkloro kaj devenanta el ĝi skriba kulturo – fabeloj kaj fabloj – la leporo (aŭ kuniĉo) estas simbolo de malkuraĝo kaj naiveco. Sed en la prezentataj afrikaj fabeloj ĝi (li!) estas reprezentanto de ruzeco, kiun por eŭropanoj reprezentas vulpo. Ruzaj estas ankaŭ la hundo kaj ĉimpanzo. La hieno kaj porko estas idiotaj. Kaj la plej saĝa besto estas testudo.

Kelkaj rakontoj havas specifon pure afrikan, kaj iujn analogojn por mi kutima folkloro ne entenas. Sed la aliaj estas tre kutimaj. Ekzemple, la rakonto pri diablo kaj terkulturisto, en kiu ili dividas rikolton je supraĵoj kaj malsupraĵoj, kaj komence la diablo ricevas supraĵojn de arakidoj kaj poste

malsupraĵojn de maizo, estas ja de frua infanaĝo konata al mi fabelo pri urso kaj vilaĝano, kiuj simile dividis supraĵojn kaj malsupraĵojn de rapo kaj tritiko! Cetere, iuj kutimaj temoj povas esti nekutime vestitaj. Ekzemple, kun granda amuzo mi legas komencon de unu rakonto: „Viro havis du edzinojn, ĉiu naskis unu filinon”. Tamen poste sekvas kutima historio pri tio, kiel virino mistraktas la nepropran filinon, kiu, tamen, finfine gajnis.

Tre interesa, kaj karakterizanta kulturon, estas la lingvouzo. Ĝi nenio-kaze estas erara, sed certa uzo de la vortoj, vortordo, esprimmaniero estas iufoje nekutimaj por esperantistoj el aliaj mondopartoj. Ekzemple, kiam la hundo kaj ĉimpanzo iras svatiĝi al la homaj filinoj, tiuj fianĉinoj estas konstante kaj insiste nomataj ĝuste „filinoj”, sed ne knabinoj aŭ junulinoj! Aŭ jena nekutima uzo de transitiveco: „loĝi la teron”. Kaj jen proverbo: „Ĉio ajn kion faras iu, li tion sur sin mem metas”. Sendube, ju pli da popoloj uzas Esperanton, des pli ĝi riĉiĝas.

Stranga impresio venas de la ilustraĵoj. Ili estas faritaj bele, profesie; duono el ili estas koloraj kaj, ĝenerale, tre taŭgas por la enhavo de la libro. Sed la desegnisto, plej verŝajne pola (indikoj pri tiu persono en la libro mankas, sed klaras, ke li ne estas afrikano), havas nulan nocion pri zoo-logio, kio estas grava manko por ilustranto de libro, kie temas pri bestoj, eĉ se fabelaj roluloj. Ial hieno estas pli simila al lupulo, anstataŭ ĉimpanzo estas desegnita paviano, kaj anstataŭ pantero (=leopardo) – tigro! La lasta eraro estas des pli bedaŭrinda, ke la tigroj tute ne loĝas en Afriko. Do, belaj, sed draste eraraj ilustraĵoj estas senduba manko de la libro.

La plej ĉefa manko de la libro estas, tamen, alia. Malgraŭ tio, ke la libro estas, unuavice, direktata al infanoj, al infanoj ĝi estas tute ne rekomendinda pro la ĉefa litertiparo, per kiu es-

tas presita la teksto. La teksto imitas manskribitajn leterojn, kaj la legado pro tio estas malfacila. Porinfanaj libroj devas esti presataj per la plej klaraj preslitteroj, kaj ĉiuj normoj pri tio insistas. Do, al infanoj indas nur laŭtlegi la rakontojn.

Do, la libro estas tre interesa, grava por ĉiufanka pliriĉigo de la esperantlingva kulturo per afrika dimensio kaj tial nepre akirinda kaj leginda. Ni esperu, ke la kamerunaj samideanoj daŭrigos sian laboron kaj preparos novajn librojn, el kiuj ni pli ekscios pri la afrika kulturo kaj pensmaniero. Sed, bedaŭrinde, tiu ĉi libro ne tre taŭgas por unu el siaj ĉefaj celoj – senpera legado fare de infanoj.

Nikolao Gudskov

Herman Nyeck Liport, Chamberline Nguéfack Zedong: *Historioj ... Rakontu! Aŭ la Saĝulo, la Ruzulo, kaj la Idiotulo. Instruaj rakontoj el Afriko*. Eld. AfrikNatura-Esperanto, Douala, Kameruno, 2006. 125 paĝoj, kudre bindita.


Prezo ĉe FEL: 18,00 eŭroj + afranko.

La libroj kaj diskoj recenzitaj en MONATO estas mendeblaj de la Retbutiko de FEL,

Frankrijklei 140,
B-2000 Antwerpen, Belgio.
Tlf. + 32 3 234 34 00;
tlk. + 32 3 233 54 33;
rete: retbutiko@retbutiko.net;
skajpe fel-monato
aŭ per www.retbutiko.net.



Atentinda dramartaĵo



Legi dramtekston estas iom malesperige, ĉar necesas bildigi al si la scenejon, la aspekton de la aktoroj, la sonon de iliaj voĉoj, la gestojn kaj esprimojn, kiuj realigas, kiel homon, la nomon sur la paĝo. Tial reĝisoro estas kvazaŭ dua aŭtoro, ĉar ŝi/li decidas, ĝuste kion vidos la spektantaro, donante vivon al la skribitaj vortoj.

Manke de rigardeblaĵo/aŭskultaĵo dramo ĉesas esti arto kaj fariĝas nur pseŭdoliteraturaĵo. (Mi devas escepti, kompreneble, kelkajn dramojn, neniam vere celitajn por enteatrigi.) Ĉi tiu dramo en presita formo riskas perdi sian esencon, ĉar la leganto devas esti samtempe reĝisoro kaj spektanto. Kiam oni raportas pri spektita dramo, onia raporto, tamen, estas tre subjektiva, kaj ĉiu spektanto komprenas ĝin propramaniere. Sed kiam oni nur legas nespektitan dramon, onia raporto nepre estas tiom subjektiva, ke ĝi valoras preskaŭ nenion. Tial mi ne volas taksu ĉi tiun dramon, ĉar mi scias, ke neniu du homoj sammaniere konceptos ĝin.

Temas pri preskaŭ sensceneja scenaro, t.e. preskaŭ malplena ludloko.

Da mebloj estas nur kvin tabloj. La leganto (kaj ankaŭ la spektanto) devas imagi por si mem, ke temas pri oficejo en ia komerca entrepreno. Da videblaj aktoroj estas seso; krome kelkfoje aŭdiĝas eksteraj voĉoj.

Preskaŭ ĉiu rolanto havas almenaŭ du apartajn nomojn. Spektante la dramon, oni sendube ne konfuziĝas pri tio, kiu diras/faras kion. Dum legado helpas skribi por si liston de la rolantoj kun la nomoj, kiujn ili pretendas por si. Preskaŭ senescepte la temo de la dramo estas la interrilatoj de la rolantoj. Eksteraj eventoj kelkfoje menciigās, sed estas necentraĵo.

Krome, multe helpas almenaŭ dufoje tralegi la dramon. (Kaj, mi suspektas, du- aŭ pli-da-foje spekti la aktoratan dramon.) Ĉar eksplikoj plejparte mankas en la dialogo; kaj la agoj, eble eĉ pli precize la mienoj, de la aktoroj esprimas multon, kion ne klarigas la dialogo.

Ĉu iel eblus, ke la eldonisto metu viddiskon de la dramo enscenigita? Mi kredas, ke per tio multoble profitus la dramo.

La aŭtoro klare estas talenta. La dramo, laŭ sia maniero, estas kohera. Mi kredas, ke ĝi povus inde rangi apud la antaŭ nelonge eldonita viddisko de *La duonokulvitro* kaj tiel krei la fundamenton de vera dramarto esperantlingva.


Kritiketo necesas, ne pri la dramo, sed pri la presita teksto. Komposteraroj ĝenas kaj almenaŭ unufoje misgvidas la leganton. Abundas mankantaj akuzativoj, do ankaŭ ilin la leganto devas imagi por si mem.

Atentinda dramartaĵo.

Donald BROADRIBB

Anna Maria Dall'Olio: *TabeLO*. Eld. Edistudio, Pisa, 2006. 61 paĝoj, kudre bindita. ISBN 978-88-7036-074-5.

Prezo ĉe FEL: 16,82 eŭroj + afranko.



Ronald Cecil Gates jam estas bone konata pro sia serio de krimromanoj kaj kromrakontaroj, lokitaj en universitato aŭstralia. Ĉi tiu estas ankoraŭ plia aldono al la

Nova krimromano el Aŭstralio

sezonserio, konsistanta el *La septaga murdenigmo*, *Kolera afero*, kaj *Morto de sciencisto*, kiuj reprezentis intrigojn en la somero, aŭtuno kaj vintro, respektive.

Ĉi-foje temas pri docento de botaniko, kiu, dum klasekskurso en arbaro, ekmalaperas kaj troviĝas morta pro pafiĝo. Ĉu lin murdis unu el liaj klasanoj? Alia universitatulo? Aŭ ĉu temas pri kverelo, tute sen rilato al la universitato? Dum sekurgardisto Petro Tomson kaj polickomisaro Roberto Elis enketas, ili trovas, ke la morta docento estis implikita en iuj kontraŭleĝaj monĝajnaj entreprenoj. Kaj, ke en tiu arbaro oni neatendite malkaŝis kultivaĵon de ..., nu, legu la libron por trovi, pri kio temas.

La stilo de Ronald Cecil Gates estas relative facila, kaj oni ne bezonas multe cerbumi por kompreni la intrigon. Tio estas kaj pluso kaj minuso literaturaj. Malsimile al tio, kiam oni le-

gas krimromanon de Agatha Christie, oni ne trovas lerte kaŝitajn spurojn, en la sinsekvo de eventoj. Kaj la idento de la kulpulo estas ne divenebla ĝis la fino de la libro. Do tiel intelektostreĉa la romano ne estas. Tamen ĝi estas interesa kaj ne pretendas esti pli ol distra legaĵo por ordinara esperantisto. Jen celo, kiun ĝi tre bone plenumas. Vi ĝuos ĝin.

Mi rimarkis, legante la verkon, ke la lastatempa kutimo uzi formojn, kiajn *-atis*, *-intas*, *-intis* ktp kondukas al la ekapero de verboformoj, intence ellasitaj el Esperanto de Zamenhof: perfekte, pluskvamperfekte, imperfekte k.a. Ĉu tio estas vera pliriĉigo de la esperanta verbosistemo? Mi ne certas.

Donald BROADRIBB

Ronald Cecil Gates: *Mortiga Ekskurso*. Eldonis Flandra Esperanto-Ligo, 2006. 111 paĝoj gluitaj. ISBN 90 77066 23 3.

Prezo ĉe FEL: 10,00 eŭroj + afranko



Sen Rodin

Bildoj pri Norda Lando kaj aliaj rakontoj

NOVA!

Juna Sudlandano vizitas landon de Nordanoj ... enamiĝas en ĝi, kaj en Nordlandanino. Kiel noktopapilio li ne povas rezisti kaj tuj reiras por kaptiĝi en lanternan fajron, senbedaŭre kaj konscie.

Ĉiu ĉapitro estas aparta originala noveleto pri iu aŭ alia norda gemo. La novelaron sekvas alia novelaro de aliaj apartaj kaj tre allogaj miniaturaj.

Donald Broadribb pri ĝi komentis: „Ĉi tiu kolekto de 51 rakontoj rangas inter la plej majstraj verkoj de la aktuala esperanta literaturo.”

ISBN: 90 77066 22 5
Pezo: 320 g
Prezo ĉe FEL: 24,00 €
+ afranko.

Mendu ĉe Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio;
www.retbutiko.net, retbutiko@retbutiko.net, aŭ ĉe via kutima librejo.

Gvatu la turon!

Fariseoj admonis Jesuon pro tio, ke li malrespektis la leĝon de Dio, dum li plurfoje resanigis malsanulojn dum sabato¹. Jesuo mem pravigas malrespekton al la leĝo de Dio per „Mi deziras bonfaradon, sed ne oferon”². Laŭ Jesuo resanigi malsanulon pli gravas ol la leĝo.

Mia patrino

Antaŭ kelkaj tagoj mia patrino kaŭzis al ni grandan maltrankvilon. Ŝia piedo estis operaciota, kaj antaŭ la kirurgiado ni iris viziti la kuraciston. Surprize el sia mansako ŝi elteris dokumenton subskribotan de ŝi kaj de la kirurgo, en kiu ŝi konstatigis sian volon tute malakcepti sangotransversadon. Kaze de komplikiĝo dum la operacio, mia patrino preferis pere.

De antaŭ kelkaj tagoj Jehovo-atestantoj vizitadis ŝin kaj faris tiujn – de ili nomatajn – bibliajn studadojn. Intertempe mi interesiĝis pri tiu organizaĵo kaj priinformiĝis el pluraj fontoj. Ne necesas tro esplori por malkovri, ke la societo *Watch Tower Bible Track and Society of Pennsylvania* estas perversa. Ĉiun normon, dogmon, studon kaj decidon oni prenas en centra oficejo, tiel do, ke kiu fieras studi la biblion, tiuj, fakte, nur sekvas la instrukciojn elpensitajn en la centra oficejo situanta en Novjorko.

Estas suspektinda la fakto, ke ĝia sidejo en Hispanio troviĝas en Torrejón de Ardoz, urbo apud Madrido, kie troviĝas usona milita bazo. Ankaŭ estas suspektinda la fakto, ke ties instruadoj asertas, ke Unuiĝintaj Nacioj estas kreaĵo de Satano, ke ĝia anaro ne rajtas voĉdoni nek opinii politike, kaj ke oni neniel devas agi por pli bona mondo, ĉar tion Jehovo-dio faros mem.

El kristana vidpunkto, tia doktrino estas tute senfundamenta. Ili uzas propran kaj tre falsitan version de la biblio,



Pluraj eldonaĵoj – kiel lernolibroj kaj revuoj – estas necesaj por plifortigi la doktrinon de la Jehovo-atestantoj

rekte tradukitan el la anglalingva modelo. Neniu scias, kiu kreis tiun modelon en la angla, tiel do, ne eblas scii, kiuj estas la fakuloj, kiuj korupte tradukis al la angla la tekstojn el la klasikaj greka kaj hebrea. Kaj tamen, eĉ tiel, multaj el iliaj instruadoj tute ne plu kongruas kun ilia biblio, kaj pluraj eldonaĵoj – kiel lernolibroj kaj revuoj – estas necesaj por plifortigi ilian doktrinon.

Risko

El racia vidpunkto la afero estas eĉ pli grava. La organizaĵo konvinkas bonkorajn homojn falintajn en ĝian kaptilon pri tio, ke tiu ilia religio estas la sola vera religio kaj ke ne estas rekomendinde havi amikojn ekster la organizaĵo. Krome, ĉiuj estas konvinkitaj, ke se iam iu sukcesas konvinki iun anon pri la falseco de iliaj instruoj, efektive estas Satano mem, kiu parolas pere de tiu ĉi homo.

Bonŝance mia patrino estis sukcese operaciita sen komplikaĵoj, kaj neniu

sangotransversado estis necesa, aliokaze la kirurgo estus devigita lasi ŝin pere. Mi estas certa, ke ne temas pri tio, kion volis ŝi, sed pri tio, kion la organizaĵo *Watch Tower* voligis al ŝi.

Ŝiaj samreligiaj rekomendis ne atentigi la familion pri la ekzisto de tiu leĝa dokumento malpermesanta la kuraciston doni sangon al ŝi, eĉ okaze de bezono.

Antaŭ nelonge mi legis en ekzemplero de la revuo *La gvato-turo* tre detale, kiel testamenti favore al la organizaĵo sen havi leĝajn problemojn kun familianoj. Mi nun timas ne nur pri la sano de mia patrino, mi ankaŭ timas perdi mian loĝejon post ŝia forpaso.

Ferriol MACIP I BONET

1. Mt 12:12; Lk 13:10-17; Lk 14:1-6; Jn 5:9; Jn 7:22; Jn 9:13.
2. Mt 12:7.

Sidejo de la societo Watch Tower Bible Track and Society en Brooklyn.



Kial vere kolapsis la tri turoj de MKC?

Ĵurnalistoj raportis pri la kolapso de du turoj de la Monda Komerca Centro (MKC) la 11an de septembro 2001, kiam ilin trafis du flugmaŝinoj. Nun specialistoj pridemandas la oficialan raporton. Kio vere okazis en tiu sortoturna evento, kaj kio estas la fono de tia katastrofa mondska atako? Ian Fantom priesploras ...

Preskaŭ ĉiu, kiu sufiĉe aĝas por memori la murdon de la usona prezidanto Kennedy [kénédi] en 1963, memoras precize, kie li estis en la momento, en kiu li aŭdis la novaĵon. Verŝajne simile estos pri la murdo de preskaŭ tri mil homoj en la du turoj de la Monda Komerca Centro en Novjorko la 11an de septembro 2001.

Mi mem estis tuj elironta al vojaĝagentejo por mendi flugbileton, kiam mi aŭdis la unuan anoncon, kaj meze de la negocoj, kiam mi aŭdis pri la sugesto de terorista atako. Poste mi vidis la kolapson de la du turoj, kaj, kiel ĉiu alia, miris pri la disciplina maniero, en kiu la turoj falis, ĝuste kvazaŭ ili estus malkonstruitaj de specialista malkonstrua kompanio.

Mi tamen ne estis fakulo, kaj mia atento rapide transiris al la homa situacio, al la konfessivbendo de Osama bin Laden, al la terorisma agado de Alkaido, al la supozata subteno de ilia terorisma agado fare de la registaro de Afganio, kaj, kiel preskaŭ ĉiu alia, mi estis konvinkita pri la bezono forigi tiun fonton de terorismo.

Provo malmaski

En decembro 2006 pro momenta impulso, mi entajpis en Google, sed anglalingve, „David Shayler, eventoj, 2006”. David Shayler [dejdvid ŝejla] estas konata nomo en Britio, ekde kiam li forlasis la militinteligentan servon MI5 fine de 1995, kune kun sia tiama partnero Annie Machon [ani maĉon]. Ili havis zorgojn pri ekscesoj de la brita milita inteligento, kaj decidis, ke jam venis la tempo malmaski la aferon, riskante la sekvojn de tiu rompo de la Akto pri Oficialaj Sekretoj^{1,2}.

David Shayler raportis pri intervenoj de MI5 en britaj organizaĵoj – eĉ etaj – kiuj prezentas nenian minacon al la brita sekureco^{3,4}. Temis ne nur pri gvatado, sed ankaŭ pri rekta interveno por malmunti asociojn pro celoj aliaj ol nacia sekureco. Ĝenerale temis pri maldekstraj organizaĵoj, kiel la Komunista Partio de Granda Britio, la Socialista Laborista Partio, sed ankaŭ la Kampanjo por Nuklea Malarmado (CND). Aperas nun eĉ raportoj, ke Tony Blair [teŭni blea] estis agento de MI5 en la Laborpartio kaj CND, antaŭ ol li fariĝis ĉefministro⁵.

Por kompreni, kiel tio povas funkcii, necesas havi komprenon pri la temposkalo de tiaj projektoj. Laŭ la estro de la londona metropola polico, Sir Iain Blair [ian blea], oni bezonis dudek jarojn por penetri la Irlandan Respublikan Armeon⁶. Por penetri je tia nivelo, la ĉefa rolo estas gajni kredindecon. Por terorisma organizaĵo oni havus iujn spionojn en strategie gravaj pozicioj, kiuj donus al la kaŝservoj informojn, sed la interveno venus de la polico, aŭ de aliaj branĉoj de la militaj servoj.

Troigoj de sekretaj servoj

El aliaj fontoj ni scias, ke dum la malvarma milito MI5 troigis la minacon de sovetia komunismo^{7,8}. Ĝenerale la homoj supozis, ke la Komunista Partio estas sub reĝo de Moskvo; ĝi ne estis. La sovetia sekreta servo KGB estishezitema pri la Komunista Partio de Granda Britio, ĉar ĝi sciis, ke ĝi estas serioze penetrata de MI5³.

David Shayler raportis, ke kiam oni petis, ke li transprenu la operacion malmunti la Komunistan Partion, kaj aliajn

organizaĵojn, estis kvardek agentoj en la partio, kaj ke temis pri tre longdaŭra projekto. MI5, li raportis, sciis pli multe pri tio, kio okazas en la partio ol la komunistoj mem. Unu tekniko uzata estis kvereligi la homojn inter si. La partio estis facile penetrebla, li raportis, ĉar la komunistoj ne estis konsciaj pri sekureco. Li finis tiun operacion, sed la partio kolapsis ĉiuokaze.

Tamen la ĉefa kaŭzo de lia eksigo de MI5 levigis, kiam li eltrovis pri nerajtigita plano murdi la prezidanton de Libio, kolonelon Muammar Gadafi. MI5 pritraktas enlandan sekurecon, kaj eksterlandan sekurecon pritraktas MI6. Pri la afero Gadafi li eksciis, kiam li traktis kun sia ekvivalentulo en MI6. Ŝajne la registaro sciis nenion pri tiu plano. Tio signifus, kompreneble, ke la kaŝservoj funkcias ekster la reĝo de demokratie elektitaj politikistoj, kaj ke ili povus havi la propran tagordon en planado de murdoj kaj intervenoj tutmonde sen demokrateca reĝo aŭ kontrolo.

David Shayler fuĝis al Parizo, sed poste libervole revenis al Britio por alfronti juran procedon, por argumenti defendon de publika intereso. Lin defendis juristo de *Liberty* (Liberio), la organizaĵo por civitanaj rajtoj en Britio. Li tamen pasigis du monatojn en brita malliberejo.

Perpleksitaj britoj

En 2003 eksplodis la milito en Irako, kaj la mondo miris pri la milita inteligenteco provizita de MI6 kaj la usona sekreta servo CIA pri armiloj de amasa detruo. La britoj estis perpleksitaj. Britoj konsideras sin la lulilo de demokratio, kaj ili tutsimpe ne falsas aferojn por doni pretekstojn eniri agresajn militojn. Certe oni supozus, ke la registaro scias ion, kion la popolo ne scias. Poste, iom post iom, la vero evidentiĝis, kaj la britoj devis akcepti la eblecon, ke la propra registaro lanĉis agresan kaj kontraŭleĝan militon kontraŭ Irako.

Tamen ne estis la agado de MI6, kiu igis min entajpi tiujn vortojn en la serĉilon de Google; mi havis kelkajn zorgojn rilate al MI5. Mi estis nova membro de *Liberty*, kaj ĉeestis unu jarkunvenon. La membronombro kreskis en tiu jaro de sep mil ĝis naŭ mil. Oni diris, ke tio estas rezulto de membrokampanjo, sed mi kiel

membro ne estis konscia pri membrokampanjo. Pli verŝajne ĝi estis rezulto de grandskala publika zorgado pri la civitanaj rajtoj en la lando.

Mi intencis resti kvieti en la jarkunveno, sed rapide mi maltrankviliĝis. Venis propono doni al la komitato la rajton eksigi iun ajn komitatanon, kiu diras ion al ĵurnalistoj ne aprobitan de la komitato. Tuj mi avertis, ke ĝuste ion tian oni atendus de homoj, kiuj volas forpreni civitanajn rajtojn, ne protekti ilin. Oni povus serioze misuzi tiun rajton por silentigi homojn. Mi mem vidis ion similan en alia organizaĵo. Multaj kontribuantoj sekvis per similaj argumentoj, kaj oni elĵetis la proponon. Private, mi demandis min, ĉu MI5?

En decembro mi scivolis, kion faras David Shayler nuntempe. Tuj mi trovis, ke li prelegas diversloke en Britio, kun sia partnero Annie Machon, pri la atako kontraŭ MKC.

Vero-kampanjo

La Brita Vero-Kampanjo pri „9-11” agadas, por ke la mondo sciu ĝuste, kio okazis en la amasmurdo de la 11a de septembro 2001⁹. La ideo, ke tio povus esti interne organizita falsflaga operacio unue ŝajnis bizara, sed la unua impresio



pri la kolapso de la turoj ja estis, ke estas io stranga pri tio, ke ĝi vere aspektas kiel regita malkonstruo, kun antaŭplantitaj eksplodaĵoj diversloke en la turoj por kaŭzi vertikalan kolapson. Tiun ideon studis profesoro pri fiziko, kaj li konkludis, ke ĝuste tio ĝi estis¹⁰. Neniel, li argumentis, du flugmaŝinoj povintus faligi tiajn turojn. La turoj estas konstruitaj por rezisti tian eventualaĵon. Eĉ la posta brulo ne atingus sufiĉe altan temperaturon por



sufiĉe moligi la ŝtalan strukturon por kolapsigi la konstruaĵon. Li kalkulis la tutan energion de fluganta avio, kinetan kaj ĥemian, kaj konkludis ke tio estus bagatelo kompare kun la energio bezonata por kaŭzi la kolapson.

La metalo rapide forkondukus la varmon, kaj oni devus provizi sufiĉan varmon por altigi la temperaturon de plimalpli la tuta strukturo. Eĉ se tio okazus, la strukturo ne falus simetrie, sed falus dise, ĥaose. Vidbendoj de la kolapsoj montras klare fortégajn eksplodojn, unue ĉe la bazo de la konstruaĵoj, kaj poste en sinkronizita maniero de la supra malsupren. La sinkronizado estis tia, ke la supra etaĝo falis libere, senreziste, kio ne okazus, se ĉiu etaĝo falus pro la frapforto de la pli altaj etaĝoj. La oficiala versio estis laŭ li ridinda.

Enigmaj kolapsoj

Ankaŭ ĥemiisto studis la ĥemion de la postrestaĵoj, kaj konkludis, ke plej verŝajne la turoj kolapsis pro eksplodo de termito (*thermite*), aŭ de militgrada termato (*thermate*), alteperatura eksplodaĵo uzata ĝuste en la malkonstruo de tiaj strukturoj^{11, 12}. Kiel indikon de la alteco de tiuj temperaturoj, li atentigis, ke eĉ unu semajnon poste troveblis ankoraŭ likva aluminio. La ĥemiiston oni maldungis.

Eble la plej enigma kolapso estis triaturo, kiu eĉ ne estis frapita de flugmaŝino, kaj kiu suferis nur de relative malgrandaj bruloj, sed kiu tamen kolapsis kelkajn horojn poste. Enigma estis ankaŭ la damaĝo en Pentagono (la usona ministrejo pri defendo); la truo ne estis sufiĉe granda, mankis signoj de flugmaŝinaj motoregoj, kaj estis trovita motoro de misilo.

Tuj oni kulpigis Osama bin Laden, teroriston loĝantan en Tora Bora, grotoj en la fora montaro de Afganio, ĉeffiguron en la terorista organizaĵo Alkaido, subtenata de la afgana taliba registaro. Tamen la konfesi-vidbendo de Osama bin Laden evidentiĝis esti falsita, kaj Alkaido estis nomo inventita en Usono. Oni trovis ankaŭ memorandon de la Bush-teamo, verkitan antaŭ lia elekto kiel prezidanto, kiu asertis: „Ni bezonas novan Pearl Harbor.”¹³

Sed ĉu povus esti kredeble, ke iu kreus tian falsflagan atakon je tia skalo, kiel pretekston komenci militon, kiu malstabiligos la tutan mez-orienton, enkarcerigante sep cent „malamikajn batalantojn” en Guantánamo Bay [bej], kaj, kiel oni nun raportas, sendante centojn da kaptitoj por pridemandado sub torturo en tute nerilataj landoj?¹⁴ Kio povus esti la fono malantaŭ tiu nekredblaĵo, kaj kiel ĝi povus esti evoluiĝinta, sen ke la usona aŭ la brita publiko eĉ suspektu, ke estas io malĝusta?

Danĝeroj al demokratio

Eble la solvo troveblas en la adiaŭa prelego de la usona prezidanto Dwight Eisenhower [dŭajt ajzenhaŭer] la 17an de januaro 1961¹⁵. Li parolis pri la danĝeroj al demokratio de tro forta ligo inter giganta militestablaĵo kaj granda militserva industrio – la „milit-industria komplekso”. „La potencialo por katastrofa mislokado de potenco ekzistas kaj persistos”, li konkludis.

Evidentiĝis, ke en la dua mondmilito CIA kaj la mafio kunlaboris por invadi Italion¹⁶. Evidentiĝis, ke tiu alianco daŭris, kun enplektiĝo de sekretaj societoj. La mafio, oni raportas, enplektiĝis en la armilindustrio.

La posteulo de Eisenhower, prezidanto John Kennedy [ĝon kenedi], fame prelegis pri la minaco de sekretaj societoj al demokratio kaj libero de la informkomunikiloj. Pasie li pledis por demokratio¹⁷. La 22an de novembro 1963 en Dallas, Teksaso, prezidanto Kennedy estis mortpafita, kaj multaj atestantoj poste mistere mortis.¹⁸

Nun la parolo estas pri kaŝa influo de tiuj sekretaj societoj, kiuj laŭdire havas milionojn da membroj tutmonde, kaj kiuj delonge parolis kviete pri „Nova Monda Ordo”. Jen afero harhirtiga por tiuj, kiuj strebas al harmonio kaj mondopaco.

Ian FANTOM

Referaĵoj:

1. *MI5 Bugged Mandelson, Mail on Sunday*, 1997-08-24, p. 1.
2. *Ex-MI5 spy arrested as he claims Gadaffi death plot, Sunday Times*, 1998-08-02, p. 1.
3. *Defending the Realm: Inside MI5 and The War on Terrorism*, Mark Hollingworth kaj Nick Fielding, Andre Deutsch Ltd (2003-06-02, paperbindita, tria reviziita eldono), 376 p., ISBN 0233000100.
4. *Spies, Lies and Whistleblowers: MI5 and the David Shayler Affair*, Annie Machon, 420 p., The Book Guild Ltd (2005-05, tole bindita), ISBN 185776952X.
5. Prelego en Bristol, 911 Truth Campaign, *Bristol Evening Post*, 2005-09.
6. Intervjuo en BBC Radio 4, programo *Today*, 2007-01.
7. *The Plot Against Harold Wilson*, BBC-televideo, BBC2, 2006-03-16 21:00.

8. *Wilson „plot”: The secret tapes, Brian Wheeler, news.bbc.co.uk*, 2006-04-09.
9. *British 9/11 Truth Campaign (www.nineeleven.co.uk)*.
10. *Why indeed did the WTC Buildings Collapse?*, Professor Steven E. Jones, 9-11 Truth Campaign (www.nineeleven.co.uk), 30 p. (vidbendoj ĉe video.google.com).
11. *Kevin Ryan on Guns and Butter – Lies about the WTC*, www.911truth.org | multimedia.
12. 9/11 – *A Closer Look*, Kevin Ryan, Vidbendo: www.nineeleven.co.uk/board/view-topic.php?t=1990
13. *The New Pearl Harbor: Disturbing Questions about the Bush Administration and 9/11*, David Ray Griffin kaj Michael Meacher MP, 214 p., Arris Books (2004-04-06, paperbindita), ISBN 1844370364.

14. *Ghost Plane: The Inside Story of the CIA's Secret Rendition Programme*, Stephen Grey, Hurst & Company, London, (2006, tole bindita), 305 p., ISBN 1-85065-850-1.
15. video.google.com serĉu sub „Eisenhower”.
16. *Italy and the legacy of the Cold War, Anna Bull, European Research Institute, Occasional Paper 8*, inaŭgura prelego ĉe Universitato de Bath, Britio, 1997-05-22.
17. video.google.com: serĉu: *Speech on Secret Societies and Freedom of the Press*.
18. *Analysis of reports and Data Bearing on Circumstances of Death of Twenty-one individuals connected with the Assassination of President John F. Kennedy*, Thomas H. Neale, The Library of Congress Congressional Research Service, 1978-06-05.

ANONCETOJ

Fantomo hantas tra l' mondo. 16-a konferenco por (eks)komunistoj en Dobrichovice, Ĉeĥio, 2007/09/12-16. Aliĝilojn mendu ĉe Dieter Rooke, Äussere Klus 14, CH 4702 Oensingen. Rete: IKEK2007@gmail.com.

... **jarfine al IF!** Festu novjare kun ni la plej faman aranĝon por familioj kaj plenkreskuloj! Kun ampleksa prelega programo dumtage, kun tuttaga ekskurso, kun alloga vespera propono, kun silvestra bufedo kaj silvestra balo, kun apartaj programoj por infanoj kaj gejunuloj, kun la fama kaj ŝatata trinkejo "Knajpo". Petu informojn de IF, Platz, Postfach 1148, D-34303 Nidenstein. Tel./Fakso: +49 5624 8007. Interrete www.internacia-festivalo.de.

"**Naturista Vivo**", la ilustrita revuo por nudistoj/naturistoj/nudnaĝantoj. Belaj koloraj fotoj. Senpaga provokzemlero. La revuo aperas 4-foje jare, sur 16 paĝoj. Internacia Naturista Organizo Esperantista. Adreso: Jozsef Nemeth, HU-8531 lhász, Fö u. 41/5. Rete: jozefo.nemeth@gmail.com.

Ĉu vi scias, kio estas Esperanto-sudoko? Esperanto-sudoko estas sudoko-enigma, en kiu oni ne serĉu 9 ciferojn, sed 9 literojn, nome la literojn el la vorto „Esperanto"! „Sudokoj", enigma libreto kun 80 diversaj enigmoj, kun ciferoj je 4 niveloj, sed ankaŭ kun literoj kaj eĉ spegulbildaj, nun aperis okaze de la 10-jara ekzisto de la Retbutiko. Ĝi signifas por vi horojn da enigma-plezuro! Prezo: 3 eŭroj + afranko ĉe ĉiuj bonaj libroservoj kaj ĉe www.retbutiko.net.

Esperanto-instruistoj: vizitu www.edukado.net. Ĉio de vi por vi!

Prezo por anoncetoj (nur teksto, sen fotoj, desegnaĵoj aŭ kadroj): 1 eŭro* por unu linio. Sama anonceto kvinfoje sinsekve: triobla tarifo. Sama anonceto ankaŭ en la reta versio de MONATO: duobla tarifo. Minimuma faktursumo: 12 eŭroj*. Por pli grandaj anoncoj petu la tarifon de la eldonejo aŭ rigardu al http://www.esperanto.be/fel/mon/mon_anon.php.

*Por Eŭropa Unio: + 21 % AVI.

La ondo de esperanto

Ĉiumonata soci-kultura revuo en Esperanto



Abonebla kontraŭ

27 EUR
30 USD
aŭ egalvaloro

ĉe UEA, FEL, ELNA, UFE, EAB, SEF kaj dudeko da aliaj landaj perantoj

Fondita en 1909. Refondita en 1991. Eldonata en Rusio

- Tiel ni vivas: raportoj el la postkomunisma mondo
- Tra Esperantujo
- Niaj problemoj: revuoj, eseoj, intervjuoj, polemikaĵoj
- Lingvaj respondoj de Sergio Pokrovskij
- Historio kaj kulturo de Esperanto
- Recenzoj pri la novaĵoj de la libromarkato
- Mozaiko: krucvortoj, konkursoj, kvizoj, humuraĵoj
- Literatura suplemento semajnfine

SOCI-KULTURA REVUO EN ESPERANTO

La KancerKliniko

Politika Kultura Skandalema Ajnista
4 numeroj jare + La Krom

REGULAJ KUNLABORANTOJ: Serge Sire, Michel Duc Goninaz, Hu Guozhu, Ionel Onet, Mikaelo Bronŝtejn, Arnau, Laŭrenco Septier, Mao Zifu, Jopetro Danvy, Petro Braŭn, Gennadij Turkov, Fra Gaeta, Vilhelmo Lutermano, Ĵak Le Puil.

Abono: 22 € (ekde 14 en kelkaj landoj)
Jacques le Puil, pĉk 12 729 73 X Paris
aŭ ĉe UEA, FEL, ELNA, ktp
ikk@free.fr

OSIEK-Konferenco 2007
Pazarĝik, Bulgario, 14a-20a de julio

MITOJ KAJ LEGENDOJ

Atribuado de OSIEK-premio 2007
Postkonferencaj ekskursoj dum 3 tagoj

Informoj, aliĝoj:

- Georgi Mihalkov (Julian Modest)
tel.: (02) 934-42-55 retp.: modest@abv.bg
- Eric Laubacher
tel.: + 33 1 30 96 67 91 retp.: kasisto@osiek.org



<http://osiek.org>

Antverpeno festas pro 100-jara ekzisto de la klubo «La Verda Stelo» per **INTERNACIA RENKONTIĜO**

PROGRAMO : **Elektebleco el paralelaj programoj:**

- ✦ Prelegserio «Kulturo de la Kluba Vivo» kun diskuteblecoj
- ✦ Kunveno de Kunlaborantoj de Vikipedio
- ✦ Turisma programo:
«Esploru Antverpenon» pere de gvidataj vizitoj
- ✦ Vesperaj programoj :
Sabato 26/05/07 - JOMO
Dimanĉo 27/05/07 - Popolmuziko kaj dancado en Moderna Vesto.
- ✦ Festaj manĝoj
- ✦ Tranokteblecoj ĉe Esperantistoj kaj en 3 kategorioj de hoteloj

**Jam nun notu la
daton en via agendo
Pentekosto:
26, 27 kaj
28/05/2007**

**Petu la alsendon de faldfolio kun detaloj ĉe: Esperanto-Antwerpen@esperanto.be
aŭ rigardu : www.geocities.com/esperanto_antwerpen**